4-a Jaro. N-o 202/203 APERAS  SEMAJNE 23. Aŭgusto 1928

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

LA FAŜISMO EN JAPANIO

Mirigite oni legas (en tiu ĉi n-o de "S-ulo") la noton pri la polickontrolo super neŭtrala esperantista kongreso en Japanio. Sed oni komprenos tion, se oni scias, kiom la registaro favoras la faŝismon kaj ĝiajn elementojn.

Dum la lastaj monatoj la japana reakcio fariĝas pli kaj pli aroganta. Cetere tio ne povas surprizi, ĉar malgraŭ ĉiuj malfaciloj kaj kontraŭstaroj la klasbatalo de l' proletaro kaj de la malriĉaj kamparanoj konstante plifortiĝas. La regantaj klasoj sentas kaj komprenas tion bone, kaj iliaj plej perfortemaj kaj plej fanatikaj elementoj grupiĝas ĉirkaŭ la nigra standardo de l' faŝismo. Ne hazarde oni, dum la lasta jaro, montris en ĉiuj kinoj de Japanio filmon, kiu prezentas Musolini-n kiel duondion. Ne plu estas hazardo, ke la grupoj kaj organizoj, kiuj, kun vera praveco, sin nomas la imitantoj de siaj italaj antaŭuloj, ne ĉesas plimultiĝi.

La plej influhava kaj plej grava asocio estas sendube la "Kenkokukai", kio signifas proksimume "Societo por reveno al la tempo de l' fondiĝo de Japanio". Kiuj estas la celoj de la "Kenkokukai"?

"La anglo-amerika kapitalismo kaj la rusa komunismo — tiel estas klarigite en la programo de ĉi tiu asocio — estas egale nedezirindaj por Japanio." La aktuala tasko estas "grupiĝi ĉirkaŭ la imperiestro kaj konstrui Japanion, kiu estas movata de la spirito de l' unuaj tagoj post la fondiĝo de l' japana imperio". La historia misio de tiu ĉi renovigita Japanio estas la kreo de ĝenerala homara kulturo, kun la japana nacio en la fronto de la koloraj rasoj. La tuta imperio estas unu familio, la imperiestro estas ĝia patro kaj la regatoj estas liaj infanoj. La imperiestro devas regi komune kun la popolo; ĉiuj aferoj devas esti decidataj akorde kun "la publika opinio". La kvar kastoj konataj en la malnova Japanio: la soldatoj, la kamparanoj, la urbaj metiistoj, la komercistoj devas esti egalrajtaj. "La restarigo de tiuj ĉi malnovaj idealoj estigos novan vivon en la lando. Sed tiuj, kiuj forgesas ĉi tiujn idealojn kaj kiuj sin malpurigas per vanaj teorioj eŭropaj, devojigas la patrion de ĝia vera vojo." La ĉefaj signalvortoj de la "Kenkokukai" estas: "Por la imperiestro kaj la patrio! For la kapitalismon! Por la imperiestro kaj la patrio! For la komunismon! Por la imperiestro kaj la patrio! For la malnovajn partiojn!"

Kiuj estas la ĉefoj kaj membroj de la Kenkokukai? Ĝia kerno estas konsistigata el la oficiroj kaj reakciaj oficistoj. Ili estas rekte kunligitaj kun la polico kaj la ministro de l' interno. Oni estas pravigita supozi, ke la nuna ministro por internaj aferoj, Susuki, subvencias la Kenkokukai per publika mono. La Kenkokukai estas sub la oficiala patronado de la heroo de l' rus-japana milito, la admiralo Togo. Inter la veraj gvidantoj de la Kenkokukai oni trovas la ĉefgeneralon Kida, la ĉefgeneralon Ĉata Sindsiro ktp. La prezidanto de l' asocio estas la faŝisto Uesigi, profesoro ĉe la universitato de Tokio. Oni devas mencii ankoraŭ alian personon, Nakagava, kiu ludas grandan rolon tiurilate, ke li estas ĉefo de la centop-taĉmentoj de la Kenkokukai. La membroj de l' asocio rekrutiĝas inter la etkomercistoj, kiuj estas tiel multnombraj en Japanio, inter la bonstataj kamparanoj, la posedantoj de metilaborejoj, inter diversaj laboristaj grupoj, sed prefere inter tiuj, kiuj ankoraŭ ne tute estas disigitaj de la terpeco. Sume, la membrokvanto de l' asocio sumiĝas je 50 000.

Kia estas la aktiveco de la Kenkokukai? Ĝi malsukcesigis la strikon de l' ministoj en la baseno de Dsioban kaj provis ankaŭ (parte vane) bridi la strikon de l' laboristoj de la fabriko Noda. Tiu ĉi heroa striko, kiu daŭris pli ol ses monatojn, finiĝis tute freŝdate per kompromiso. La 7-an de novembro 1927 la Kenkokukai detruis la ejojn de l' maldekstra laborist-kamparana partio (Rodo Nominto). Ĝi ankaŭ volis detrui la sidejon de l' proletjunularo kaj malsukcesigi la batalon de ĉi lasta favore al la malplilongigo de la servotempa daŭro. Ĝi ruinigis la redaktejojn de Tokio Asaĥi kaj Osaka Asaĥi, du ĵurnaloj, kiuj dum la elektoj esprimis ioman simpation por la proletaj partioj. La Kenkokukai militiris en ĉiuj ĵurnaloj furiozege kontraŭ la laborist-kamparana partio kaj Sovetio. Ĝi postulis la likvidon de l' unua kaj la rompon de l' rilatoj kun Sovetio. La atenco en la korto de l' soveta ambasadorejo en Tokio, la 23-an de marto, estas same ago de la Kenkokukai.

Tio sufiĉas por doni imagon pri la "laboro" de l' japanaj nigraĉemizuloj. Kvankam ilia programo diras: "For la kapitalismon! For la komunismon!", ili celas "por la momento" nur la komunismon. Kaj ne nur por la momento! Ni konas la historion de l' itala faŝismo.

Kapitalismo malraciigas siajn viktimojn

La 30-an de junio karbmineja katastrofo okazis en la urbeto Roŝ-la-Moljer' (france: Roche - la - Molière) apud St. Etienne en Francio. 12 kilometrojn distancas ambaŭ urboj. Ankoraŭfoje en la regiona baseno, minekspluatado mortigis 48 laboristojn kaj vundis 20. Ne necesus rakonti, kiel laboro en terprofundaĵoj amase mortigaĉas homojn, kiuj profesias la plej teruran metion de nia kapitalista civilizo, se ĉiuj proletoj kunsentus saman danĝeron.

Jen la fakto: Antaŭ tri jaroj karbbruleto ekminacis parton de la minejo, kaj por eviti eventualan akcidentegon, la direkcio decidis ŝtopi la subterajn vojojn ĉirkaŭ la brulejo. Spite evidenta malprofito, la fosado ĉesis apud la flamiĝanta karbdensaĵejo kaj daŭris nur pli malpli malproksime, kvankam tio ne plaĉis al la kompanio.

Sed nova metodo estis trudata de la ekspluatantoj al la ekspluatatoj! La direktoro maldungas maljunajn inĝenierojn kaj anstataŭigas ilin per "lertaj" teknikistoj pli junaj. Samtempe tiuj "junuloj" postulas de la ministoj kroman laboron, elfosigante pli kaj pli la multekostan nigran ŝtonon. Por akiri maksimuman sperton, la "junuloj" intencis denove ĉerpigi karbon direkte al la "malpermesita" danĝerejo.

Okazis la neeviteblo! La ministoj ĉiam sube elfosante iom post iom malfortigis la baron starigitan inter ili kaj la bruletanta karbo. Tiam, matene je la 7-a, terfalo rompis tubon, kiu kondukis premitan spireblan aeron al la laborantoj. Tuj la karbo ĝis nun bruluma subite ekflamis disirigante venenajn gasojn tra la ĉirkaŭaj vojoj, kie komencis labori 200 ministoj. Sufokiĝante, la modernaj sklavoj provis forkuri, sed asfiksio atingis ilin: francoj, poloj, hispanoj, marokanoj kadavriĝis dum unu horo. Kiam oni sciigis al la ĉefdirektoro pri la afero, tuja ideo prezentiĝis antaŭ lia sprito: malaperigi kiel eble plej rapide la signojn de l' dramo. Pro tio li iris persone al la ŝakto, kaj opiniante, ke la savantoj ne rapidis sufiĉe, li insulte ekkriis: Malkuraĝulaĉoj! Mallaborulaĉoj! — Malgraŭ la klopodoj por kaŝi la veron al popolo, malgraŭ prokrastemo por informi la aŭtoritatularon, la plej granda kulpulo ne kapablis deteni ploregojn de vidviniĝintoj kaj orfiĝintoj. Kiel kutime en ĉia okazo, kiam malfeliĉo skuas laborulan popolon, ministro, departementestro, urbestroj ktp. vizitas la malbenitan lokon alportante fikondolencojn al suferintoj, manpremante kaj gratulante la savantojn, konsolante la viktimajn familianojn, disdonante tie ĉie honorajn medalojn, esplorante la laborejon, kie mortis "niaj karaj laboristoj". Kvazaŭ kvieto povus eniĝi la koron de l' mizeruloj per impona ceremonio, la minestraro aranĝis belegan enterigon. La kadavroj de tiuj, kiuj penadis sian tutan vivon en infero de minejo, estis kuŝigataj en ĉerkon ornamitan per granda Kristo el plumbo kun trikolora labormedalo. Tiel forta estis la deziro vuali la mortigon, ke eĉ ĉerkoj de mahometanoj estis kristanigataj. Tiumomente parlamentaj fipolitikistoj, regionaj administrantoj, episkopa moŝto sin deklaris amikoj de l' laborularo. Paroladante ĉe la entombigo, unuj diris: "Rajtojn al laboro", aliaj: "Ni zorgos estonte, por ke ne plu okazu la samo", kaj la episkopo diris: "La Eklezio salutas la mortintojn kaj la minejkompanion. Ĉu la ministoj estas pentofarintaj antaŭ la morto?" Kaj la ĉefdirektoro provis klarigi sian senkulpecon per "naturaj fortoj" kaj "fatalo". Lastmomente, por fini la komedion, inĝeniero laŭte alvokis ĉiun mortinton laŭ ĝia individua nomo kaj tuj poste ĉefministo elparolis: "Mortinta sur la kampo de honoro." Tiel daŭris la vokado de la nomoj krom tiuj de la marokanoj, kiujn oni alvokis per iliaj labormatrikuloj, ĉar sendube estas tro strange, elparoli arabajn nomojn. Hipokriteco! Certe ili ne mortis sur la honora kampo, sed nur sur la forraba kampo kapitalista kiel dum la milito. La mortkondiĉoj ŝajnas diferencaj, la kaŭzoj restas la samaj.



Sperta ministo: la departementestro! Malsuprenironte en minejon

Ni diru, ke ne estas fatalo, kiu kaŭzis la morton de l' ministoj, sed nur "raciiganta" kapitalismo. Ĉu estas fatalo, kiu mortigis milionojn da homoj dum la tutmonda milito? Ne! Fatalo estas taŭga vorto, kiun uzas ĉiu kapitalisto, kiam krimo estas monstreca kaj nekaŝebla. Certe la ministsindikatoj akuzas la direktoron je maldiligento pri atentigo de l' laborista delegito al asekuro. Paralele al burĝa justeco, la sindikatistoj enketas. Tamen ili ne havas iluziojn pri la sorto rezervota al la kulpuloj.

La kompanio realigas profiton de 83000000 da frankoj de 1919 ĝis 1926. Tia sumo parolas sufiĉe per si mem por komprenigi la gradon de sklavigo ĉe la ministoj. Per novaj labormetodoj konsistantaj el aplikado de teknika ilaro, t. e. raciigado, la kadavriganta kapitalismo celas eltiri maksimumon da profito, pro tio uzegante fortojn de l' Laboristaro ĝisoste. Laboristoj el tuta mondo suferos pli kaj pli je subpremo de nuntempa akriĝanta ekspluatado, ĝis ili konsentos mem raciigi sian klasbatalon per tutmonda fratunueco. Nur praktiko de komuna lingvo povas efektivigi la unuecfronton internacian.

La mortintaj ministoj en Roŝ-la-Moljer' naskiĝis en diversaj landoj: en Francio, Polio, Hispanio, Maroko. Ili parolis malsamajn lingvojn kaj ne interkompreniĝis. La kapitalismo sukcesis kunvenigi ilin en profunda minejo, la kapitalismo sukcesis paroligi inter ili kiun lingvon — tiun de fosilo kaj ŝovelilo. Sed, rimarkinde, la sama kapitalismo pli malpli helpis ilin al parola m i s interkompreniĝo kaj malhelpas ilin je dumviva sennaciiĝo. Tion farante ĝi estas logika. Ni, proletoj, sennaciuloj, estu tiel logikaj kiel la kapitalismo, ĉiam kontraŭbatalante ĝin. Ni estu senlace tiuj, kiuj kondukos la Proletaron al vera kaj justa sennacieco.

H. R i v a l (126), St. Etienne.

SAKKO KAJ VANCETTI

Ĉu vere jam pasis unu jaro depost tiu tag-nokto, kiam ni febris pro la sorto de du malfeliĉaj homkreaĵoj, kies sola "krimo" estis fidele esti servintaj al la afero por liberigo de suferantaj kunhomoj? Kiam nin ekskuis kiel martelfrapo la telegrafa sciigo, ke la nekredeblo estis farita: Sakko kaj Vancetti ekzekutitaj de la dolar-potenceguloj per kruelega torturo post sepjara turmentado en karcero? Ĉu iam pli teruran spektaklon prezentis al la mondo sub la masko de leĝa justeco kaj religio la riĉula bando? Ĉu iam antaŭe regnestroj riskis pli malkaŝe, pli malvarmsange, pli senhonte mokegi kaj malestime piedtrakti la unuiĝintajn protestojn de tutmonda laborista klaso? — Por fimortigi, meze de "trankvila pacperiodo", per kalkulanta racio, kun ĝuo je la suferoj de la viktimoj, du simplajn, noblajn kaj honestajn K-dojn en la alrigardo de milionoj da proletoj, kiuj aŭdis la helpkriojn de la dispolvigotoj... Kia provokego! Kia piedbatado en la vizaĝon de humaneco kaj homrajtaro!... Sentimentaleco? Ho, kiu kredis al ĝi — kiom vekis lin la nuda reala vero de fakto! La klasa malamiko ne estas sentimentala: — Estu ni mem klare vidantaj, raciece pensantaj! Tago de memoro! Tago de kolero! Nenio estas forgesita! SAT-anoj, — ni kiuj aspiras la samajn idealojn kiel la du heroe mortintaj batalintoj — en la spirito de Sakko kaj Vancetti ni faru senlace nian laboron — por h u m a n e c o kaj l i b e r e c o!

N. B.

La grenrikolto en Usono

Rikoltlaboristo en Usono povas, se li volas, labori en la rikoltkampoj kaj la draŝado de junio ĝis la neĝo falas. Ĉar en ŝtato Oklahama la rikolto komenciĝas en junio. En julio oni rikoltas en Kansas kaj Nebraska, kaj dum aŭgusto en suda kaj norda Dakota. Por la r i k o l t o la farmistoj dungas kaj pagas la laboristojn bezonatajn. Por d r a ŝ i oni dungas en malsamaj lokoj laŭ diversaj metodoj. Rikoltistoj ricevas tage $ 2,50 ĝis $ 4 kaj manĝaĵon kaj laboradas 10 horojn. Multaj el tiuj, kiuj havas grandan draŝmaŝinon, zorgas pri dungado kaj pagado de ĉiu laboristo. Ili havas kuirejan kaj dormejan tendojn transporteblajn kaj kunportas ĉion. La farmistoj mem nur pagas la tre grandan prezon al la maŝinestro kaj ne okupas sin cetere pri la laboristoj. Sed aliaj farmistoj ekzistas, kiuj mem pagas kaj manĝigas la laboristojn. Tiuj lastaj dormas en fojnejo aŭ en la pajlamaso. Se pluvas, ili nur pli profunden enŝovas sin en la amaso. Feliĉe malofte pluvas, sed regas ofte forta vento.

Antaŭ tri jaroj mi iris al norda Dakota por draŝi. Mi laboris 40 tagojn kiel hejtisto. Estis granda maŝino, kaj oni bezonis ok ĉevalarojn, kiuj alportis la grenon, por funkciigi la maŝinon. Ĉiam kvar viroj enĵetis la faskojn. Mi hejtadis per pajlo, kaj certe amasegon da pajlo mi forbruligis.

Jen mia taga vivo. Je la 4-a mi vekiĝis kaj trenis min el la pajla amaso. Tuj mi aliris la kaldronon kaj purigis la fajrujon. Por fari tion, mi devis enrampi la fajrujon kaj elmovi la cindron. Ĉion puriginte mi enŝovis pajlon kaj ekbruligis ĝin. Poste mi nur enŝovis la pajlon tiel rapide kiel ĝi forbrulis. Foje oni alportis al mi matenmanĝon, foje mi iris al la domo por manĝi. Ankaŭ same okazis pri la tagmanĝo. Je la 7-a oni komencis draŝi, kaj la tutan tagon mi enŝovis pajlon. Je la 12-a oni tagmanĝis, kaj je la 13-a ree ekfunkciis la maŝino. Je la 18-a la laboro ĉesis, kaj mi zorgis pri la fajro, la aliaj pri la ĉevaloj. Ni vespermanĝis ĉirkaŭ la 19-a kaj poste iris al la pajlamaso kaj enlitiĝis. Mi ricevis $ 5,50 tage, la ĉevalistoj kaj aliaj $ 4—4,50 kaj ankaŭ la manĝaĵon. Se estas pluvo, tiel ke oni ne povas labori, ĝenerale la laboristo devas pagi por manĝaĵo $ 1—1,25 tage. La farmistoj ĉiam klopodas doni plej bonan manĝaĵon por la draŝistoj. Ankaŭ je la 10-a kaj 15-a horo oni alportas "lunĉon" (inter-manĝon) al la laboristoj. En Idaho kaj Vaŝington oni uzas multe la kombinitajn maŝinojn. Tia maŝino tranĉas kaj draŝas la grenon samtempe en la kampo. Aŭ oni alkroĉas ĉ. 30 ĉevalojn al ĝi, aŭ oni uzas traktoron.

D. B. C. 10 449.

☆

Letero el sendependa Portugalio

La ĉefaj problemoj en nia lando estas solvataj de la registaro ĉiam en senco kontraŭlaboristara. La akiritaj rajtoj de la laboristoj formalaperas, la okhora labortago, la strikrajto ktp. La domo de la Ĝenerala Laborista Konfederacio (C. G. T.) jam delonge estas fermita kaj ankaŭ preskaŭ ĉiuj sindikatoj. La laboristaj gazetoj estas konfiskitaj, ilia aperado malpermesita. La laboristaro tial ne posedas defendilon kontraŭ la atakoj de la burĝaro.

La registaro posedas speciale bonorganizitan policon, al kiu apartenas multaj laboristoj sen klaskoncio, kiuj fariĝis spionoj. La fiagentoj subaŭskultadas la konversaciojn de l' laboristoj. Ili agas tage kaj nokte, denuncante seriozajn K-dojn kaj ĝuante iliajn suferojn. Justeco estas nekonata vorto. La konatoj, kiuj konfideme dubas pri la perfidaĉo de tiaj denuncistoj, fariĝas iliaj unuaj viktimoj. Sen juĝo tiuj ĉi malfeliĉaj K-doj estas kondukataj al la kolonioj kiel krimuloj. Oni eĉ parolas pri pafmortigo de iuj, kvankam ekzistas leĝo en Portugalio, kiu malpermesas tiun ĉi ekzekutmanieron depost praavaj tempoj.

La labor- kaj loĝeja krizo estas la du plej gravaj problemoj, kiujn la registaro ĉiam promesas solvi. Tamen ĉiutage la amaso da senlaboruloj pligrandiĝas. Dank' al la mizerego reganta oni trovas multajn laboristajn familiojn, kiuj enloĝas kabanaĉojn kiel necivilizitaj gentoj. Iuj eĉ loĝas sur kampoj, ĉar iliaj mizeraj salajroj ne sufiĉas eĉ por manĝi. Dume, en nia urbo Lisbono ekzistas multaj domegoj, kiuj estas loĝataj nur de muŝoj kaj musoj, ĉar la ambicioj de la domposedantoj estas nesatigeblaj. Oni aperigis centojn da leĝoj por solvi tiun ĉi demandon. Sed ĉar la leĝfaristoj ankaŭ apartenas al la ekspluatanta klaso, en ĉiuj leĝoj oni trovas paragrafon, kiu permesas la plialtigon de l' luprezo.

Bedaŭrinde granda parto da laboristoj en Portugalio ankoraŭ ne konvinkiĝis pri la neceso de klasbatalo, kaj ili preferas helpi al la burĝaro, anstataŭ aliĝi al proleta organizo.

(12 199)

☆

La vivo de la aŭstria laboristaro

Post longdaŭra batalo ni en Aŭstrio, same kiel en aliaj landoj, povis akiri, a l m e n a ŭ l e ĝ e, la enkondukon de la okhora labortago. Ĝenerale la laboro komenciĝas en la fabrikoj je la 7-a h. kaj finiĝas duonon post la 16-a kun unuhora tagmeza paŭzo. Sabate posttagmeze kaj dimanĉe oni estas libera. En ŝtataj aŭ komunumaj entreprenoj ne ekzistas fiksa deĵoro. La salajro estas diferenca; ĝi estas 40—75 ŝilingoj[1]) po semajno. Tiuj, kiuj perlaboras 75 ŝil. aŭ iomete pli, estas la plej bone pagataj. Sed ekzistas ankoraŭ branĉoj, kie oni perlaboras nur 25 ĝis 40 ŝil. Ekzemple en la brikfarejoj la laboristoj sentas sin feliĉaj, kiam ili povas perlabori 35 ŝil., multaj salajras nur 25—30 ŝil. kaj eĉ malpli. Tiuj, kiuj ankoraŭ ne konas la vivon de ĉi tiuj laboristoj, ne povas imagi, en kia mizero ili vivas. La tuta familio, edzino, infanoj laboras en la brikfarejo. Ili ne konas bonajn vestaĵojn nek bonajn loĝejojn. Kvankam ili faras brikojn, ili tamen ne havas super si bonan tegmenton. Precipe en la provinco la laboristoj ne salajras tiom,

---

[1]) 7 ŝilingoj = 1 dolaro.

kiom en Vieno. Kiel mezan salajron oni povas nomi en la provinco 40 kaj en Vieno 50 ŝil. Ĉe privata entrepreno la jara libertempo estas unu semajno kaj post la 5-a konstanta laborjaro 2 semajnoj. Pli oni ne ricevas. Koncerne la ŝtatajn aŭ komunumajn entreprenojn, la salajro pli altiĝas laŭ la deĵorjaroj. Ĝi estas de 50—80 ŝil. posemajne, kaj la libertempo plialtiĝas kun la deĵorjaroj, tiel ke post la 15-a jaro oni havas 4 semajnojn. Pli ol 4-semajna libertempo ne ekzistas. Krome tiuj personoj estas pensiataj. La ŝtato, urbo kaj la laboristaj faksocietoj ankaŭ donas senlaborulan helpon. La senlaborulo ricevas subvencion de 12,60—17,50 ŝil. po semajno.

Kompare kun la salajroj la vivrimedoj estas tre multekostaj. Ekz. 1 kg da faruno kostas 0.72—0.80 ŝil. (1 ŝil. = 100 groŝoj), 1 kg da sukero kostas 0.90—1.00 ŝil., 1 kg da terpomo 0.20—0.60 ŝil., 1 kg da graso 3.60 ŝil., 1 kg da butero 6—7 ŝil., 1 peco da pano (ĉ. 1.19 kg) 0.88 ŝil. Pli frue laboristo povis aĉeti, se li ricevis mezan salajron, por semajna salajro 750 kg da terpomo aŭ 214 kg da faruno. Kaj nun oni povas aĉeti por meza salajro nur 275 kg da terpomo aŭ 70 kg da faruno. Pli frue oni povis aĉeti por dusemajna salajro eksterordinare bonan vestaĵon (kostumon viran). Nun oni devas labori almenaŭ unu monaton por sama vestaĵo.

La leĝa luprezo ne estas granda, sed la domoj ĉiam estas renovigataj, kaj la luantoj ĉion devas pagi. Pro tio la luprezo ĉiam plialtiĝas; kaj se oni kalkulas la diversajn pordomajn elspezojn, oni pagas pomonate 8—15 ŝil. (por ĉambro kaj kuirejo). Sekve oni preskaŭ tutan semajnon devas labori por kvaronjara luprezo.

Kvankam ne estas permesite labori pli ol 48 horojn semajne, tamen oni ne bezonas miri, ke multaj laboristoj faras kromhorojn, ĉar per tiel mizera salajro oni ne povas vivi kiel homo. Precipe familioj kun infanoj ne povas ĝui la liberan aeron. La senlaboreco en Aŭstrio ankoraŭ ĉiam estas tre granda. Fine de aprilo 1928 ekzistis 140 000 subtenataj senlaboruloj. Nature multaj miloj estas, kiuj neniajn subtenojn ricevas. Nur en la grandaj entreprenoj oni povas seninterrompe labori kelkajn jarojn. En la malgrandaj laborejoj la posedantoj antaŭ la laŭleĝa libertempo ĉiam maldungas la laboristojn.

Fakte ekzistas nur tre malgranda parto da laboristoj, kiuj vere povas ĝui la "leĝan" okhoran labortagon kaj la libertempon. Eĉ en la ŝtataj kaj komunumaj entreprenoj oni faras kromlaboron, ĉar sen tio la proletoj ne povas aĉeti al si vestaĵojn. En la ŝpinfabrikoj oni strikas jam pli ol 10 semajnojn pro kelkaj groŝoj. Tie la laboristoj perlaboras 25—50 ŝil. Same oni strikas en la malsupra parto de Aŭstrio, sed tie ne nur pro salajraj aferoj, sed ĉefe pro tio, ke la ekspluatistoj volas aĉeti la animojn de la laboristoj. Ili volas enkonduki la faŝismon en la laborejo. Sed ili ne havos facilan sukceson, ĉar la provincaj K-doj estas iomete pli revoluciemaj ol la vienaj (en la provinco la mizero estas pli granda ol en Vieno).

Junio 1928.

La Viena SAT-rondo.
(Kompilis SAT-ano 8863).

KRIMIĈAŬ[1)]

Gravega datreveno

Negranda teksindustria urbo ĝi estas kun nur 28 000 loĝantoj, sed tamen ĝi ĝuas mondfamon kaj ofte oni parolas pri ĝi kiel "Saksia Manĉestro". Sed la mondfamo de la krimiĉaŭ-aj teksaĵoj nur servas al la ĉi urba fikapitalistaro por plenplenigi monŝrankojn je kostoj de malsatanta laboristaro.

Ankaŭ alian mondfamon havas la urbo Krimiĉaŭ, mondfamon pro la heroa batalo de la tekslaboristaro kontraŭ ĝiaj subpremantoj dum la jaro 1903. La krimiĉaŭ-aj teksistoj en aŭgusto 1903 postulis kolektiv-kontrakton kun la 10-hora labortago. Tiu ĉi postulo fariĝis la kaŭzo, ke la teksfabrikantoj maldungis 8000 geteksistojn. La agitistoj en Krimiĉaŭ havis la subtenon de la tutgermana burĝaro. Tiel okazis, ke la nomo Krimiĉaŭ en la historio de la laborista movado atingis mondfamon. 8000 proletoj en Krimiĉaŭ havis mondon kontraŭ si. La policistaro ne permesis iun ajn kunvenon de la strikantoj. Tamen ili unuece komencis la batalon. Al la vendistoj de vivnecesaĵoj estis rekomendite nenion pruntedoni al la strikantoj. La domposedantoj estis alvokitaj elloĝigi ilin. Tamen la strikantoj persistis en la striko. La saksia registaro plimultigis la policistaron per aro da perĉevalaj ĝendarmoj, sed ankaŭ tio ne faris impreson al la teksproletoj. Fine eĉ la ekleziularo estis mobilizata kontraŭ ili. Tamen ili ne pensis fini la batalon.

---

1) Germane: Crimmitschau.

POETO ŜEVĈENKO

Tutmonde konata per multaj nacilingvaj tradukoj estas la ĵus solene festita fama verkisto Maksim Gorkij. Malpli konata eksterlande estas la plej granda poeto de Ukrainio, Taraso Ŝevĉenko. Li estis tiel populara en Ukrainio, ke oni tie ne trovus homon, kiu ne konus lin. Rimarkinda fakto estas, ke multaj homoj, kiuj ne scipovas legi kaj skribi, tamen scias parkere liajn versaĵojn. En vilaĝaj dometoj kaj urbaj laboristaj loĝejoj, en kluboj, lernejoj kaj oficejoj pendas lia karakteriza portreto. Multaj kluboj, lernejoj, bibliotekoj, muzeoj kaj teatroj portas lian nomon. Societoj kaj sciencaj institucioj kolektas materialon pri liaj vivo kaj verkoj.



T. Ŝevĉenko (1814—1861)

La ĉefverkon de Ŝevĉenko "Kobzar" oni eldonas en centmiloj da ekzempleroj. Liaj kantoj estas konataj tra tuta Sovetio kaj amataj de laboristoj kaj kamparanoj. Al multaj el liaj versaĵoj estas komponitaj muziknotoj. Kial atingis ĝuste Ŝevĉenko tian famon? Ĉar la popolo vidas en li la esprimanton de siaj revoj kaj esperoj kaj martiron por siaj interesoj kaj sia feliĉo.

Taraso Ŝevĉenko naskiĝis 25.2.1814 en mizera vilaĝana kabano de bienula sklavo. Li mem ekkonis sur sia propra korpo la malfacilan sklavan vivon. Lia animo suferis por la tuta turmentita popolo, kaj lia voĉo estis la voĉo de l' tuta popolo. Tio, kion li deziras, amas aŭ malbenas, tion saman deziras, amas aŭ malbenas la tuta popolo...

Li estis batalanto por libereco kaj feliĉo de ĉiuj mizeruloj. En 1847 la caro-ĝendarmo Nikolao I ekzilis lin Orenburgon kiel simplan soldaton. Al li estis malpermesate skribi kaj pentri (li ankaŭ estis talenta pentristo). Oni ne povas priskribi liajn suferojn kaj turmentojn. Tiele li travivis longajn dek jarojn, sed lia spirito ne estis rompita... kaj li restadis revoluciulo ĝis la fino de sia vivo.

Ŝevĉenko mortis 26. 2. 1861, ne atendinte tri tagojn, kiam okazis liberiĝo de l' popolo el servuteco (29. 2. 1861). En tago de lia morto oni dediĉas en tuta Ukrainio grandajn memorkunvenojn al li en fabrikoj, kluboj, lernejoj kaj teatroj. Somere lian tombon en Kanev vizitas dekmiloj da ekskursantoj, laboristoj, vilaĝanoj, lernantoj. Kvankam li jam mortis antaŭ 67 jaroj, li restas viva en la memoro de la popolo. La legado de liaj verkoj donas al ni forton, energion kaj entuziasmon, por batali por la feliĉo de ĉiuj laboristoj en tutmondo.

Ĝis nun ne ekzistas esperantlingva traduko de liaj verkoj. La ukrainia ŝtata eldonejo promesas eldoni en proksima tempo "Ukrainian Antologion" esperante, en kiu ankaŭ troviĝos verkoj de T. Ŝevĉenko.

Solulo (8745).

La impreso de tiu ĉi batalo al la tutmonda Laboristaro estis grandega. Amerikaj, anglaj kaj francaj gazetoj priparolis ĝin en ĉefartikoloj. La laboristaro de Berlino ĉiutage kolektis 17 000 markojn por subteni la strikantojn. La interparoloj en la fabrikoj germanaj kaj ekstergermaniaj rilatis nur al la granda striko en Krimiĉaŭ. Dum tiu tempo oni faris por konataj kantoj novajn tekstojn pri la batalantaj geteksistoj. Post 24 semajnoj la laboristaro devis ĉesigi la batalon; ne ĉar la bruteco de la kapitalistoj estis venkinta, sed ĉar ili sukcesis dungi sufiĉe da strikrompantoj el la eksterlando. El tio lernu la tutmonda Laboristaro nuntempa. La pioniroj de la laborista movado en la heroa krimiĉaŭ-a laborbatalo malsukcesis pro la diseco kaj nesufiĉa klaskonscio de la propraj klasfratoj. La tiamaj krimiĉaŭ-aj teksistoj ne atingis la 10-horan labortagon; sed ke hodiaŭ ekzistas la okhora labortago, pruvas, ke morale ili estis la venkintoj.

La 23-an de septembro, okaze de la 25-foja datreveno, okazos tutgermana memorfesto pro ĉi tiu heroa batalo en Krimiĉaŭ. Gek-doj! Samprofesiuloj el la teksindustriaj lokoj tutmondaj (Manĉestr, Lyon, Bruselo, Lodz, Ivanovo-Voznesensk ktp.) sendu amason da salutleteroj al: Deutscher Textilarbeiter-Verband, Filiale Crimmitschau i. Sa., Herrengasse 13.

MIA DOMO

Mi priskribos mian novan loĝejon, komunuman domon, por ke vi povu kompari la anglan laboristan domon kun via.

Ni vivas en nova "vilaĝo" tute konstruita por la komunumo (aliaj vilaĝoj estis konstruitaj per la komunumo mem per senpera laboro, kiel ni nomas tiun metodon de socialista konstruado) kaj la vilaĝo formiĝas el vicoj de kvar kaj ok domoj po vico. La domoj de ĉiu vico estas konstruitaj tiele, ke la kvara domo estas la sama kiel la unua; la unuaj tri domoj entenas ankaŭ la samajn ĉambrojn kaj spacon, tamen lokitajn en diversaj aranĝoj.

Mi priskribos la unuan domon de vico. La "vivĉambro"[1]) estas 5 metrojn longa, 4 metrojn larĝa kaj 4 alta. Ĝi enhavas karb-fajrujon kaj grandan fenestron, du pordojn, el kiuj unu kondukas al kuirejo, la alia al la duaetaĝaj dormoĉambroj kaj al malgranda vestejo apud la ŝtuparo. Tie ĉi troviĝas la "granda pordo", la antaŭa pordo, kiu kondukas al malgranda florĝardeno kaj al la strato.

La kuirejo, kiu havas la duongrandecon de la alia ĉambro, enhavas gaskuirilon, lavejon, manĝejon, ŝrankojn kaj keleton por karbo. Tra pordo oni forlasas la kuirejon al banĉambreto kun varmakvujo. La akvo estas varmigata laŭ volo per la karbfajro en la granda ĉambro. Varman akvon oni povas utiligi aŭ en la banejo aŭ en la kuirejo. Flanke de la gaskuirulo estas ankaŭ gasvarmigebla akvujo por la semajna tolaĵo. Elirante la kuirejon oni sin trovas en malgranda portiko kun la necesejo fronte kaj flanke la "malantaŭa" dompordo, kiu kondukas al ekstera vojeto kaj al legomĝardeno.

Kiel mi diris, la domo estas duetaĝa, kaj supre troviĝas tri dormĉambroj, unu tiel granda kiel la ĉambro malsupre, la du aliaj pli malgrandaj. La plej granda havas gasfajron, la aliaj nenian hejtilon. Ĉiu ĉambro havas fenestron, la du malgrandaj dormĉambroj kaj la kuirejo kontraŭ la legomĝardeno.

Ĉar nia domo bonŝance frontas kontraŭ parko, ni havas belan vidaĵon de la antaŭo de la domo. Trans la legomĝardeno ni povas vidi la plej proksiman vicon de domoj, la malantaŭa parto kontraŭstaras al la malantaŭa parto de nia vico. Sufiĉe apartigitaj ili estas por ne malebligi la sunbrilon kaj la trapason de freŝa aero. (Tio ne estas en la aliaj laboristaj domoj.)

La domo estas lumigita per elektra lumo kaj la kuiro okazas per gaso; pri ambaŭ zorgas la komunumo laŭ speciala "pordoma" prezo. Industriaj fabrikoj kaj magazenoj pagas laŭ "porindustria" prezo.

Sume nia minimuma pago devas esti po 5½ spesmiloj[1]) por 3 monatoj kiom ajn da elektropovo ni uzas ĝis difinita kvanto. Por plua kvanto ni pagas kelkajn spesmilojn al elektro-unuiĝo. Gason ni pagas per antaŭpaga mezurilo, kiu troviĝas en la kuirejo. Proksimume ni havas kvarhoran gasservon por 2 spesmiloj. La luprezo de la domo estas po 4¼ spesmiloj por semajno.

Tiuj ĉi novaj domoj estas la plej karaj por la laboristaro. Sed ili havas ankaŭ multajn plibonigojn, kiujn laboristo neniam antaŭe povis havi. En ĉi tiu urbo oni detruas, post longa batalado kontraŭ la posedantoj, la malnovajn domaĉojn en la centro de la urbo kaj la elloĝigitoj havas la ŝancon lui tiujn ĉi novajn domojn. Sed ofte ili ne povas pagi la grandan sumon. La mezgranda laborista salajro por nekvalifikulo sumiĝas nur je 25 spesmiloj po semajno kaj ankaŭ la senlaboreco estas granda.

Mi tre ŝatas kulturi la ĝardenon. Ni ne posedis ĝin je la komenco de la jaro, kaj tial mi ne povis prepari la grundon kiel mi dezirus. Sed mi kulturas terpomojn, brasikojn, pizojn kaj rapojn. La rikolto, precipe de l' terpomo, kiun ni manĝas multe, estas tre ŝatata. En la malgranda ĝardeno antaŭ la domo mi kulturas florojn laŭ "malgrand-burĝa" modelo. Ho, jes, ni estas nun tre "respektindaj"!

Ni estas tri kilometrojn de la centro de la urbo kaj tien kaj hejmen veturadas per komunuma aŭtobuso. Ĉar ni havas Radio-aparaton, dum la vespero ni povas restadi hejme kaj aŭskulti bonan (kaj aĉan) muzikon. Ĉar mi laboras je nokto-ŝanĝo, mi ne havas multe da tempo por aŭskulti. Dum 4 noktoj mi laboras en lanŝpinejo, po 12 horoj. Tiun aranĝon nia laboristaro preferas al la 5 noktoj 10-horaj, kiel laboras aliaj lokaj fabrikoj, ĉar ni havas longan semajnfinan libertempon. Por tiu laboro mi ricevas po 30 spesmiloj semajne. Sed nuntempe oni ofte laboras nur dum du aŭ tri nokto-ŝanĝoj semajne. La lanindustrio trapasas malbonan periodon.

Vendredon vespere mi gvidas esperantan grupeton de nia junularmovado "Socialistaj dimanĉaj lernejoj", multe studadas, aŭ klopodas perfektigi min je pli bona laboro. Mi interesiĝas pri ĉiuj sciencoj kaj fremdlanda literaturo kaj trovas, ke mia monujo ne enhavas sufiĉe da mono por kontentigi tute miajn dezirojn. Mi interesas la laboristajn kolegojn kaj ofte paroladas kaj legadas antaŭ socialistaj asocioj. La plej feliĉa momento en mia semajno estas, kiam la poŝtoficisto ŝovas la Sennaciulo-n en la leterkeston. Mi tuj ellitiĝas kaj senpacience preparas legi ĝin en la ĝardeno aŭ dum malbona vetero en lito. Mi ne estas mallaborema. Ĉu **vi** laboras nokte? Kaj mi ĉiam senprokraste kaj bone plenumas mian korespondadon.

K—A. (Anglio).

[1]) Ĉefa ĉambro por kutima restado (ne por dormi). — Red.

[1]) 1 spesmilo (esp. monunuo) = ĉ. 2 germ. mk., 2 ŝilingoj, 1 rublo.

Someraj monatoj!

Oni ekskursas! Oni kantas!

La

Proletaria Kantaro

estos utilega al vi!

Ne diru, ke ĝi kostas tro multe: Centoble rekompencata estos la mono elspezata por tiu libro!

Prezo: 2,50 mk. g.

Mendu ĉe Administrejo de SAT. Colmstr. 1, Leipzig 0 27, Germanio

ORIENTPOLITIKO

En la laborista ĵurnalo "Dimanĉa Laboristo" regule aperas artikoloj sub pseŭdonimo de "Outpost". (ekstera gardanto). Tiu verkisto speciale pritraktas la internaciajn intrigojn de kapitalistaj registaroj. La praveco de liaj konkludoj kaj vereco de liaj informoj jam kelkfoje evidentiĝis okulfrapante. En n-o de 29. 7. 28 li skribis jenon pri problemo de Ĉinio . . .

"La dokumento de s-ro Kellogg al Ĉinio — multe pli grava ĝi ja estas ol lia "pac-dokumento" — estas definitiva paŝo kontraŭ Japanio. Ne nur kontraŭ Japanio, sed ankaŭ kontraŭ Britio. Lastan dimanĉon Japanio rompis la interrilatojn kun la Kuomintang-registaro. Lastan mekredon s-ro Kellogg agnoskis[1]) tiun registaron 'de facto' (fakte) kaj proponis kontraktojn novajn por anstataŭi la malnovajn. Tiu ĉi konflikto verŝajne superregos la mondpolitikon dum longa tempo.

Japanio ruze procedis en Ĉinio kaj certe ne malprofitis. Lerte subteninte jen sudon jen nordon kaj ruze utiligante ĉiun pretekston por enmiksiĝi Japanio rikoltis al si profiton.

Ĝi rehavigis sian antaŭan pozicion en Ŝantung (kiun oni forprenis per la konferenco de Vaŝingtono). Japanaj soldatoj sidadas en Tsing-tao kaj Tsinan. La plej lasta "lum-ideo" de la imperialistoj en Tokio estas postuli pun-rekompencon por la "perfortoj" kaj okupi la urbojn kaj la fervojon kiel garantion. La apartigo de Manĉurio kaj Ĉinio estas preskaŭ kompleta. Japanio staras en Mukden kiel Britio en Kairo (Kajro). Tre ruza kaj sukcesa manovro, sed kun neevitebla rezulto de malamikiĝo kun Naciista Ĉinio. Kaj jen ĝustamomente aperas Usono.

Japanio estas malamiko — Britio pro stulta rifuzo de la Nankin-traktato ankaŭ estas malamiko. Usono, potencega financestro, sole flustras dolĉajn vortojn, proponas plibonigon de la rilatoj kun si. Kaj la Kuomintang, jam grandparte sub influo de Usono, nepre la orelon klinos al s-ro Kellogg. La nova registaro, la superreganta partio, entuziasme por-usoniĝos. Se ĝi povos, helpate de Usono, firme stariĝi, la eksterlanda politiko fariĝos por-usona, kontraŭ-japana.

Kaj kia potenco en la Pacifiko! Meditu pri nova Ĉinio post dek jaroj da usona financo kaj influo. La sorto de la Pacifiko estas en la manoj de tiu kombino. Ĉe la fino de la militado de Napoleono oni diris, ke Eŭropo estas superregata de brita financo kaj rusaj bajonetoj. Meditu pri usona financo kaj ĉinaj bajonetoj.

Jen la fono de la sentimenta pacdokumento de Kellogg. La Eksterlanda Oficejo de Britio afekte ridas pro forigo de la influo de Sovetio. Kun okuloj nur por "bolŝevika minaco" ili ne vidis la taktikon de Usono, kaj la rezultoj de tiu forgeso estos rimarkindaj. Vaŝingtono celas kuniĝon kun la plej granda imperio de la mondo. Imperio, kiu povos siatempe dispecigi la britan imperion.

Jen la plano. Pri ĝia efektivigo, kiu povas diri ion? Eble Japanio luktos por kontroli Pekinon aŭ Nankinon. Eble Britio subtenos, eble ne. Kaj Ĉinio? La vera Ĉinio? La proletaro eble sukcese ribelos kontraŭ ĉiuj. Usono jam ekpaŝis — celas kontrolon de la nova Ĉinio kaj ĉion, kion tiu kontrolo signifas."

Trad. 1242, Cardiff.

[1]) Oficiale rekoni.

GRAVA ATENTIGO

Al ĉiuj SAT-perantoj! Al ĉiuj SAT-anoj!

En la balotilo sendita kune kun la Jarlibro troviĝas tre bedaŭrinda preseraro, kiu tute malkomprenebligas la pribalotatan proponon **3.** *Tiu propono ne rilatas al la paragrafo 5, kiel estas erare presite sur la balotilo, sed al la paragrafo* **11,** *kiel estas ĝuste presite en la n-o 150/51, en kiu aperis la propono.*

Ni tre ĉagreniĝas pro tiu eraro kaj insistas por ke ĉiuj perantoj, ĉiuj aktivuloj de nia movado atentigu la SAT-anojn pri necesa korekto.

La afero ŝajnas al ni despli bedaŭrinda, kaj nepre korektinda, ke temas pri propono, kies graveco estas esenca por la estonto de nia movado. Temas ja decidi, ĉu kreiĝos ia sektorisma patriotismo, aŭ ĉu la tuta SAT-anaro fakte povos influi sur la gvidadon de la aparato en ĝia tuteco. Se nuntempe la afero ŝajnas sensignifa, principe ĝi estas tamen tre grava kaj meritas la atenton de ĉiuj voĉdonontoj Ni ne dubas, ke ili konsentos kun la decido de la kongreso kaj akceptos la ŝanĝon.

Korektoj. Bonvolu korekti en n-o 200, pĝ. 362 (versaĵo, 2-a strofo, 3-a linio): devas esti "por" anstataŭ "per". En n-o 201, pĝ. 369, kol. 1, lin. 2, legu **Tuj** anstataŭ **Iuj.** Sama kol. lin. 34 leĝu **kiom** anstataŭ **kiel;** pĝ. 373, 2-a kol., 12-a lin. de malsupre "evidentigas" anstataŭ "-iĝas".

NI RIPOZAS

(En Ruĝarmea Ripozejo de Apudvolga militregiono en Samara gubernio)

Tie, kie la Volga faras akran angulon, la vaporŝipo longe kaj laŭte fajfas kaj alnaĝas al maldekstra alta bordo. Ĉe la elŝipiĝejo, apud vilaĝaj ĉaroj kaj fiakroj, okazas la unua interkonatiĝo de la ripozontaj militservantoj. Ĉiuj havas valizojn, korbojn, infanojn. Plene ŝarĝitaj veturiloj ekveturas, kaj viglaj stepaj ĉevaloj salte portas tra granda polva vilaĝo la alveturintojn kun ilia pakaĵo. En la estinta bieno de eksprinco Samarin nun estas aranĝita Ruĝarmea Ripozejo. Por malalta pago (35 rubloj) ĉiu militservanto ĝuas ĉi tie sian monatan libertempon, ricevante loĝejon kaj bonan, satigan, nutrecan manĝaĵon.

Nun estas printempo, kaj Volga, kovrinte per siaj akvoj la dekstran bordon ĝis bluanta en malproksimo monto kaj la maldekstran ĝis ĉirkaŭanta la ripozejon barilo, superakviginte insulon kun la arbaro sur la mezo kaj kunfluiĝinte kun maldekstrabordaj lagoj, atingas en tiu ĉi loko ses kilometrojn. Ĉiuvespere sur la tuta akva spaco disŝutiĝas kantoj kaj kordaj sonoj, kaj la ripozantoj kun gitaroj kaj mandolinoj promenas en la arbaro per la boatoj.

La "Domo de Ripozo" vidiĝas el malproksimo. Ĝi similas iom mezepokan kastelon, alta, bruna, kun diversaj ornamaĵoj, verandoj kaj fera balustrado. Sed ĝi ne faras malĝojigan impreson. Ĝia fasado sin turnas al Volga sur kovritan de suno placeton. Puraj sablaj vojetoj, bedoj, sur kiuj estas atendataj floroj, arbustoj de jam floranta siringo kaj klopodantaj en la sablo "ripozantaj" infanetoj — ĉio faras impreson agrablan.

La domo estas rekonstruita. La muroj odoras per freŝa farbo. La plafonoj brilas en sia blankeco. La ĉambroj estas ampleksaj, vastaj. Tiuj, kiuj alvenis kun la familioj, ricevis apartajn ĉambrojn.

La "tago de l' ripozo" komenciĝas je la sepa horo. Post la sonoro la ripozantoj iras en lavejojn, ordigas sin kaj siajn ĉambrojn kaj kunvenas en granda manĝoĉambro en la malsupra etaĝo. Ĉi tie intermiksiĝis uniformoj de kavaleriistoj, infanteriistoj, aeristoj, artileriistoj. Multaj surhavas civilan veston, kaj oni ne povas rekoni, kiun rangon posedas la persono sin kaŝanta sub ordinara civitana jako. Ĉirkaŭe duono de la alvenintoj kunprenis la edzinojn kaj infanojn. En la manĝoĉambro estas laŭta bruo de voĉoj, ŝercoj kaj rido.

Post la unua matenmanĝo la ripozantoj disgrupiĝas. Tie oni okupas sin per teniso, ĉi tie — per kroketo, unu grupo ludas "urbetojn" (? Red.), alia — bilardon. Apud budeto kun duŝo staras malgranda vico da homoj kun lavtukoj. La akvo estas sufiĉe varma, kaj sub arda suno estas agrable sin bani sub la duŝo. Je la dekunua okazas pli satiga dua matenmanĝo. Poste rekomenciĝas la ludoj. Sed la grupoj

EL LA HISTORIO DE L' SOCIALISMO

Enkonduko: *Komencante de tiu ĉi numero, ni publikigos sinsekve en "S-ulo" sub la supra titolo ĉapitrojn el la evoluo de l' socialismo, priskribojn el la vivagado de eminentaj pioniroj de la laborista movado. Por eviti erarkomprenon, ni diru ke la vorto "socialismo" por ni ne signifas iun partion, skolon aŭ sistemon. Ĝi estas ĝenerala nomo, kiu signifas tuton de doktrinoj, aspiroj, celadoj kaj movoj politikaj kaj ekonomiaj, kiuj, sub diversaj formoj, direktiĝas al la sama celo: starigi pli bonan kaj pli justan socion, kiu certigus al ĉiu individuo senescepte la rimedon disvolviĝi komplete.* *Red.*

I. Blanki kaj la Blankismo

Blanki[1]) (1798—1854) ne postlasis socian doktrinon. Sed kiam la socialismo okupis la regionon de l' politika agado, formiĝis tuta partio socialista, kiu estis inspirita de l' politikaj kaj sociaj ideoj de la granda revoluciulo.

Blanki estis socialisto. En siaj agoj, siaj paroloj, siaj defendoj, siaj artikoloj, fine en siaj du volumoj de "Socia Kritiko" li traktis kaj pridiskutis preskaŭ ĉiujn problemojn starigitajn de la socialismo. Li ĉiam konsideris la komunismon kiel la finon de l' homara evoluo. Lia socialismo estis precipe kaj memvole negativa: Blanki ne kredis al la efikeco de sistemoj konstruitaj tute el unu peco, kiuj lasas, sume, la socialismon en la regiono de l' filozofio kaj de la literaturo. Li ne kredis plie al la utilo de partaj reformoj greftataj sur la vermotrua konstruo de l' burĝa socio; li kredis, ke la Revolucio estis haltigata de la revoluciema burĝaro, interrompata de la unua Imperio (en Francio), parte detruata de la Restarigo[1]) kaj ke, depost 1830, la burĝaro forkaptis por sia profito tion, kio konsistigis la akirojn mem de l' Franca Revolucio. Konsekvence, la batalo devus esti rekomencata de l' Proletaro kontraŭ la uzurpema burĝaro; sole venka ribelo, sekvata de diktatoreco, povus nuligi la pasintoŋ kaj meti la fundamentojn por la demokrata kaj socia respubliko, en kiu la civitanoj evoluus fine libere al la ŝtatkomunismo. En multaj punktoj Blanki estas disĉiplo de Babef[2]). Li superis sian majstron per la pensalteco kaj erudicio[3]), egalis lin je batalemo, kuraĝo kaj heroeco.



La agrimedoj, kiujn rekomendas Blanki, estas ekskluzive revoluciaj: ribelo, diktatoreco, dekretoj por detrui la individuisman socion, restarigo de la socia komuno, federacio de komunoj en la demokrata respubliko, unueca kaj nedividebla, fine sinsekva kunligiĝo de la respublikaj ŝtatoj samkonstituciaj.

[1]) France: Blanqui.

[1]) France: Restauration (1814—1830).
[2]) France: Babœuf.
[3]) Instruiteco.

---

fariĝis pli malgrandaj. Supran kaj malsupran balkonojn okupis amatoroj de suno. Kun ĉiu varma tago ili plimultiĝas. Unu grupo foriris kun la pilko en la stepon, la alia forveturis en la boatoj sur la riveron. La infanojn prenis "Onklino Ŝura", sperta instruistino, adorata de la infanoj. Dank' al ŝi, la gepatroj ĝuas la "tagon de l' ripozo" preskaŭ seninterrompe.

Je la 15-a horo ĉiuj denove kunvenas en la manĝoĉambro. La tagmanĝo konsistas el tri tre bongustaj, satigaj, ĉiutage diversaj manĝaĵoj. Boatamatoroj jam pripensas novan riverpromenon, sed la sonoro sciigas pri deviga "dormohoro". La placetoj kaj verandoj momente malpleniĝas, kaj la Ripozejo provizore silentiĝas. Post du horoj ĝi denove vekiĝas. La placetoj repleniĝas. La aero fariĝis pli freŝa, la suno malleviĝas, kaj plej akre ludas piedpilkistoj. La granda balancilo ankaŭ estas superplenigita.

Post la vespermanĝo, kiam skarlata suno, orumante la riveron kaj brulante kiel hela flamo en fenestroj de la domo, malsupreniras post la monton ĉe violkolora horizonto, en la domo ekbrulas lampoj kaj komenciĝas ĉambraj ludoj. Oni ludas ŝakon, damon, domenon; iu subite trakuras per la mano sur la klavoj de l' piano, kaj komenciĝas improvizita "festvespero" kun muziko, kantoj kaj dancoj.

Sed se la vetero estas tre bela kaj la aero varma, la ripozantoj denove disiras en la ĝardeno, kaj ĝis la finsonoro mem en lumo de luno vidiĝas homaj siluetoj kaj de Volga portiĝas, kune kun kapturniga aromo de floroj, kanto pri Stenjka Razin.

Kaj nur, post kiam preter la domo, tranĉante la noktan silenton, tranaĝas, frapante per la radoj, hele lumigita belega vaporŝipo kaj post ĝi sonoras la sonorilo, — la ĝardeno malpleniĝas kaj la Ripozejo komencas sian ĉiutagan okhoran dormon. Tiel pasas, tagon post tago, la monata ripozo de la militservantoj en la Ruĝa armeo.

V. Varankin (1116).

Tago el la vivo de ŝipa maŝinisto

Por ŝipmaŝinistoj la tago dividiĝas je tri deĵoroj. Ordinara deĵoro daŭras kvar horojn: 12-a—4-a; 4-a—8-a; 8-a—12-a tage kaj nokte. Kiel tria maŝinisto mi deĵoras de 12-a—4-a horo, la dua deĵoras de 4-a—8-a, la ĉefmaŝinisto de 8-a—12-a (sed la kvara maŝinisto fakte deĵoras por li). Kompreneble ĉio ĉi okazas sur ŝarĝoŝipo, ne sur pasaĝerŝipo, kiu lasta havas multajn maŝinistojn, se ĝi estas grandega.



Je la 23.45-a horo nokte la 4-a maŝinisto malfermas la pordon de mia kajuto kaj diras: "Unu sonorilo" (t. e. unu frapo sur la ŝipsonorilon). Mi vekiĝas kaj respondas "Jes". Kiam mi estas tute maldorma, la 4-a maŝinisto forlasas mian ĉambreton. Mi estas dormema, sed mi ne devas revi, tial mi ellitiĝas, lavas kaj vestas min. Tiam mi atendas okoblan frapon sur la sonorilon. Dingding, ding-ding, ding-ding, ding-ding. Mia deĵoro nun komenciĝis. Mi eniras la maŝinĉambron kaj malsupreniras la ŝtupetaron. Tiam mi palpas diversajn partojn de la maŝinegoj por certigi min, ke ili estas malvarmetaj. Poste, mi rigardas vitrajn montrilojn sur la kaldronegoj por certiĝi, kiom da akvo ili enhavas. Tiam mi iras malantaŭ la maŝinegojn kaj ekzamenas la pumpilojn. Unu el ĉi tiuj cirkuligas marakvon tra la kondensilo (densigilo), kaj tiele la uzita vaporo akviĝas. Alia pumpas la kondensitan (densigitan) akvon en la ŝipkaldronegojn. Poste, mi iras al la fino de la ŝipo (apud la helico) per tunelo. Supre la tunelo estas la ŝipŝarĝo. La tunelo etendiĝas de la maŝinĉambro ĝis la fino de la ŝipo. Turniĝas en ĝi la ŝafto[1]), kiu kunigas la maŝinegojn kaj la helicon. Nun mi revenas al la maŝinĉambro kaj diras al la 4-a maŝinisto, ke "ĉio estas en ordo". Tiam li eliras el la maŝinloko kaj mi estas tute sola. Ĉi tiu deĵoro estas tiel malbona, ke oni nomas ĝin "la tombeja deĵoro", ĉar ĉio estas silenta escepte la bruegon de la maŝinegoj. Nun mi iras al la hejtholdo[2]) por kontroli la purigon de la fajroj. Post kelke da minutoj mi revenas al la maŝinĉambro. Tre ofte mi konstatas per la vitraj montriloj la kvanton da akvo en la kaldronegoj. Ĉar se mankus

[1]) Horizontala akso.
[2]) Ejo, kie la hejtistoj ŝovelas karbon en la fajrujon de la kaldronegoj.

TRA ESPERANTIO

INTER NI

Neŭtralulo ekparolis: "Kiam mi konstatis, ke la esperantistaj laboristoj aparte organiziĝas, tio kaŭzis al mi ĉagrenon. Mi opiniis, ke tia apartiĝo povas nur malfortigi la tutan movadon kaj ne kredis, ke la laboristoj kapablos starigi vere vivan organizon. La sperto montris, ke mi eraris: SAT ja havas tian vivkapablecon kaj viglecon, kian mi ne antaŭvidis. Sed atentu! ekzistas en via movado sufiĉe da disigeblecoj. Vi faris nur laŭklasan fendon; ĉu ne venos la tago, kiam en via movado aŭdiĝos voĉoj predikantaj laŭpartiajn fendojn?"

Nia neŭtralulo ne parolis malsaĝe. Estas vero, ke la ideo pri laŭpartia organiziĝo povas facile naskiĝi en senpripensaj kapoj. Ĉe la fonda epoko de SAT estis eĉ K-doj, kiuj subtenis, ke nur la laŭpartia organiziĝo de la esperantistoj estas racia kaj alcelinda. Tamen tiu vidpunkto ne sukcesis; malgraŭ neeviteblaj disputoj kaj miskomprenoj, nia movado antaŭeniris per la helpo de diverspartiaj, diverstendencaj elementoj. Kaj tio estis nepra kondiĉo de sukceso.

Ni supozu, ke la malvolviĝo de la laborista esperanta movado jam fariĝis tiom ampleksa, ke oni povus kun ŝajna praveco paroli pri laŭpartia organiziĝo. Oni devas unue rimarki, ke tia eventualeco estas tre malproksima. Due estas tute neeble antaŭvidi tute precize, kiel statos la tiama laborista movado. Sekve oni simple fantazias, parolante pri la plej bona maniero organizi movadon en epoko, kies konkretaj kondiĉoj estas al ni nekonataj.

Laŭpartia organiziĝo de esperantistoj ekster ilia propra partio ŝajnas al mi sensencaĵo. Kiam ekzistos objektivaj kondiĉoj favoraj al la laŭpartia organiziĝo, tiam la partioj mem devos preni en la manojn la esperantan aferon; la partioj mem devos organizi kursojn kaj jam utiligi praktike nian lingvon. La demando pri laŭpartia organiziĝo de la esperantistoj ne tiam plu ekzistos...

— Sed kio okazos kun SAT tiutempe?

— Kio okazos? Mi ne estas profeto kaj sekve tian demandon respondi mi ne povas. Estas tamen supozeble, ke nia Asocio ĉesos esti superpartia organizo; ke ĝi starigos al si precizan soci-politikan programon, kiu tute certe ne akordiĝos kun tiu de la aliaj politikaj partioj. Kredeble la sennaciismo fariĝos la bazprincipo de tiu tutmonda partio. Dume, la sennaciismo povas esti en SAT nur tendenco, kies rajtoj ne estas pli, nek malpli grandaj ol tiuj de la aliaj tendencoj. Nia Asocio estas ja sennacieca laŭ sia strukturo, sed tio tute ne signifas, ke ĉiuj SAT-anoj devas konfesi sennaciismon. Mi ripetas: oni simple fantazius, se jam nun oni volus difini kian sorton havos SAT, kiam ĝia nuntempa celo estos pli malpli atingita. Ni simple plenumu niajn ĉiutagajn taskojn kaj ne rompu al ni la kapon por ekscii, kiel la SAT-anoj devos konduti post 50 jaroj...

E. L.

Nia vortaro bezonas ordon

Se ni publikigas la ĉi suban artikolon, tio ne signifas, ke ĉiurilate ni konsentas kun ĝia enhavo. K-do Krjukov havas certe kelkajn ideojn, kiuj ŝajnas al ni aprobindaj je teoria vidpunkto. Sed la demando estas multflanka: Logiko, reguleco, internacieco, analogio, eŭfonio, tradicio (esperanto jam ekzistas de pli ol 40 jaroj) interbatalas en la vivo de nia lingvo, kaj estas malfacile jam nun antaŭvidi, kiu el tiuj diversaj faktoroj venkos en la batalo por findecidi pri la formo de multaj vortoj. E. L.

Novaj precipe postzamenhofaj vortoj (similaj al kooperacio, kooperativo, ekzekutivo) enportas en nia vortaro grandegan malordon. Ili komplikas la vortaron k ofte rompas gramatikajn regulojn de vortfarado k etimologian unuecon de la tuta lingvo. Laŭ la regula gramatika senco la nova vorto ekzekutivo (ekzekut+ivo) signifas **kapabla ekzekuti,** sed kiel radikvorto ĝi estas sinonimo de plenumkomitato! Saman konfuzon enportas kvazaŭsufikso **-acio,** kies uzo ofte vidigas malakran lingvosenton de tiuj, kiuj senhonte k senbezone **acias** k **icias** (organizacio, civilizacio, nacionalizacio, deklamacio anstataŭ simplaj k laŭregulaj — organizo, civilizo, alnaciigo, deklamo ktp.).

La kaŭzo de l' senordo kuŝas plejparte en tio, ke ĉiuj ĉi regulrompantaj vortoj kun evidentaj sufiksoj **-iv, -oz, -io,** venis antaŭ ol ĉi sufiksoj oficialiĝis[1]). Nun la sufiksoj **-iv, -oz** k **-io** signifas: kapabla, riĉa k lando aŭ scienco, okupo. Kaj kiam estis enkondukataj la vortoj **kooperativo, ekzekutivo, grandioza, astronomio** k. s., la sufiksoj -iv, -oz, -io ne ekzistis k tial nenion signifis.

[1]) Eraro: tiuj sufiksoj ne ankoraŭ oficialiĝis. — Red.

---

akvo en ili, ili eksplodus kaj detruus la ŝipon.

Je la 0.30-a h. matene mi oleas la maŝinojn, kaj tio okazas ĉiujn tridek minutojn. Kvankam mi estas laca, mi ne devas sidiĝi, ĉar tiam pro laceco mi ekdormus. Mi rigardas la turnadon de la maŝinoj, kaj por ke mi ne difektu ilin, necesas ke mi estu atentega. Malrapide la horoj forpasas, kaj kiam la horloĝo montras la 3.45-an h., mi ĝojas kaj iras por veki la 2-an maŝiniston. Je la 4-a horo mia deĵoro finiĝas. Tiam mi banas min kaj enlitiĝas je la 4.30-a h.

La maŝinist-servisto vekas min je la 7.45-a h. kaj mi matenmanĝas. La laboro denove komenciĝas je la 9-a h. kaj mi riparas la ferdekajn maŝinojn, kiuj ŝarĝas kaj malŝarĝas la ŝipŝarĝojn. Tiu ĉi laboro daŭras ĝis la 11-a. Tiam mi estas libera ĝis tagmezo, kiam mi tagmanĝas. Dudek minutojn poste mi deĵoras denove en la maŝinĉambro ĝis la 16-a h. Tiam mi alivestas min, kaj temanĝo okazas je la 17-a. Poste mi interparoladas kun la maatoj[1]) kaj la aliaj inĝenieraj oficiroj. Je la 19-a mi enlitiĝas por prepari min por la mezdeĵoro (0-a—4-a h. nokte). Tial mi laboras 10 horojn ĉiutage escepte sabate kaj dimanĉe, kiam mi faras du kvar-horajn deĵorojn. Tio estas minimume 66 horoj ĉiusemajne.

Se la maŝinoj difektiĝas, la maŝinistoj devas laboradi nokte kaj tage por ripari ilin. Apud la ekvatoro la maŝinloko varmegiĝas, kaj la temperaturo leviĝas je 50 ĝis 55 centigradoj. Tiam la ŝvito fluas el la korpo kaj saturas la malpezajn vestojn, kiujn oni portas. Ofte ne venteto venas en la maŝinejon. Oni oleas parton de la maŝinegoj, tiam revenas sub ventolilon por iom malvarmiĝi. Post kelkminuta ripozo oni finas la oleadon. Post kvarhora deĵoro oni estas ellacigita. Oni ŝvitas tage kaj nokte. La manĝaĵoj ne akordiĝas kun la klimato. La ŝipposedantoj ne variigas la manĝaĵojn, ĉar tio kostus monon kaj la nutraĵoj estas ĉiam samaj: la ŝipposedantoj ne veturas sur siaj ŝipoj, sed sur pasaĝerŝipoj.

[1]) Marista suboficiro.

La ŝipanaro estas libera dimanĉe, kiam la ŝipo kuŝas en haveno. Sed la ŝipposedantoj penas elirigi, ĉiurimede, la ŝipojn el la haveno antaŭ dimanĉo. La britiaj ŝipposedantoj diras: "Ni estas malriĉuloj", sed kiam ili mortas, la Britia Regna Kaso multe mongajnas. La malbonan nutraĵon oni ricevas senpage, sed ĉi tio okazas nur sur ŝipoj, kiuj faras longdaŭrajn marvojaĝojn.

La salajro dependas de la grandeco de la ŝipo. Tial, laŭgrade, mi gajnas £ 14—10—0 ĉiumonate. Ne estas mirinde, ke pro malbona nutraĵo, troa laborado, klimato, moskitoj ktp. la maristoj malsaniĝas. Pro tio mi devis eniri Dartmouth-(Darmes-)hospitalon, suferante je pneŭmonio[1]) kaj mia salajro finiĝis, kiam mi eniris ĝin. Karaj K-doj, kompatu la britiajn malriĉajn ŝipposedantojn!

E. Browell (9855)

[1]) Malsano de la spirado.

Do nun ni devas revizii ĉiujn similajn novajn vortojn k konformigi ilin al spirito k al reguloj de nia lingvo, por ke ili **ne rompu nian fundamenton.** La vorto grand+i+oza post enkonduko de l' sufikso **-oz** fariĝas regulrompanta pro la superflua interlitero **i (grandoza** nun devas signifi ĝuste tion, kion signifis **grandioza)**. La vortoj mag+io, astronom+io, telefon+io k. s. signifas: sciencoj aŭ fakoj de mago, astronomo, telefono. Ili fariĝas derivaĵoj. Krome — ĉi nova signifo de l' sufikso -io etimologie **sencigas** k bone klarigas vortojn similajn al jenaj: filio (fil+io), konfesio (konfes+io), partio (part+io), kolegio (koleg+io), direktorio (direktor+io), religio (relig+io), unio (un+io) k. s. Ĉi signifo de l' sufikso -io estas vere internacia. Ĝin havas ne sole romanaj lingvoj, sed same slavaj (en la rusa semireĉ+ie = sepriver+io, ĉernoknij+ie =nigrolibr+io = mag+io, upravlen+ie=scio aŭ fako direkti ktp.). Ĝia enkonduko k oficialigo estas utila k ĝustatempa k tial estas vera devo de bona LK zorgi pri surfundamentigo de plua evoluo de esperanto.

Ĉi sube mi donas kolektitan de mi liston da vortoj regulrompantaj, kun laŭregula formo montrita paralele dekstre kontraŭ ĉiu el ili:

Aviacio	aviado (aviilo, aviileto, aviisto, aviilejo ktp.)
astronomiisto	astronomo (derivaĵo astronom+io)
administracio	administro aŭ administr+io, administrejo, administranto ktp.)
arĥitekturo	arĥitektarto (radiko arĥitekto — isto)
agrikulturo	Agrokulturo (agroleĝo, agromovado, agristo ktp.)
atletiko	atleto (atletio)
analogia	analoga (akceptita de LK)
brodkasto	disaŭdigo (disaŭdigilo, radio-disaŭdigo ktp.) (radio-sendilo, radio-akceptilo)
civilizacio	civilizo (civilizeco, civilizanto)
centimetro	centonmetro (kiel dekonmetro, milonmetro ktp.)
cirkelo	cirklilo (kiel liniilo, cirkli = fari cirklon)
centralizacio	alcentrigo, alcentriĝo
dispozicio	dislokiĝo, dislokigo
demonstracio	demontro (stratdemontro, demontriro ktp.)
deklamacio	deklamo
direkcio	direktio aŭ pli simple la direkto (koleg+io de direktantoj)
decimetro	dekonmetro (centonmetro, milonmetro)
dekametro	metrodeko (kiel metrocento, metromilo ktp.)
delegacio	delegitaro (radiko deleg')
decimala	dekuma (centuma, dekduuma, triuma ktp.)
dislokacio	dislokiĝo, dislokigo
diferencialo	diferenciilo, diferencio = perdiferenca kalkulo (kondiĉa), ĉi vorto devas esti klarigita k oficialigita
ekskluzive	eksklude (kiel konklude, enklude)
emancipacio	emancipiĝo, emancipigo
ekspedicio	ekspedo (ekspeditaro, ekspedejo, ekspedi)
ekzekutivo	plenumkomitato (ekzekutivo estas kapablo ekzekuti)
ekspozicio	ekspozejo (ekspozi, ekspozato, ekspozanto)
feminismo	virinismo
fakultativa	nedeviga
emisio	moneldono
grandioza	grandoza
gimnastikisto	gimnasto
inkluzive	enklude (kiel konklude, eksklude)
iniciativo	iniciato (iniciati; iniciatinto — ne iniciativinto, iniciat+io = kapablo iniciati)
iluminacio	ilumino
internacionalo	internacio
imperialismo	imperiismo (kiel internaciismo, spiritismo ktp.)
inflacio	moninvado
kilometro	metromilo (kiel metrodeko, metrocento ktp.)
konklude	kiel enklude, eksklude
kolektivismo	okaze ne estas regulrompanta. Kolektivo devas havi du signifojn: 1. kapablo kolekti; 2. aro da samfakanoj.
konstelacio	kunstelaĵo (ne stelaro)
konkurenco	konkuro (konkuri, konkuranto, ne konkurencanto)
kolekcio	kolekto
koncentra	samcentra (koncentracio = densiĝo, grupiĝo)
kooperacio	koopero, kooperio (radiko **kooperi)**
kooperativo	koopervendejo, koopermagazeno, koopersocieto, -ejo (kooperivo = kapablo kooperi)
komisariato	komisario (koleg+io de komisaro)
konservativa	konservema, konservemiva
laboratorio	laborejo, eksperimentejo, provejo
legitimacio	laŭleĝigo
lingvistiko	lingvistio (lingvisto)
militarismo	okaze ne estas regulrompanta
ministerio	ministrio (koleg+io de ministro)
Mediteraneo	Meztermaro (meztermarano ktp.)
milimetro	milonmetro (kiel centonmetro, dekonmetro ktp.)
manifestacio	manifestado (manifesti, manifestanto ktp.)
nacionalizacio	alnaciigo
klasifikacio	laŭklasigo
ekspropriacio	elproprigo
prostitucio	prostituo
provincialismo	provincvorto, provincesprimo (tute ne ismo). Nia vortaro ne devas esti registrilo de ĉiu sensencaĵo simila al la vorto provincialismo. Estus tre bone tute ne registri similajn mallogikaĵojn, eĉ se ili estas "internaciaj".
relativa	rilativa (rilat+ivo)
protektorato	protekto
observatorio	observejo, stelobservejo, ĉielobservejo, astronomiejo.
oponento	opozanto
opozicio	opozo (opozi, opozanto, opozemo)
procesio	soleniro (kiel funebriro, demonstriro ktp.)
pacifismo	pacigismo aŭ simple pacismo
redakcio	redaktio (koleg+io de redaktantoj)
racionalizacio	laŭraciigo
subvencio	subteno, monsubteno
tranzite	transe
spiritualismo	**idealismo** en filozofio, **animismo** en etnogr., **spiritismo** en okult.
pontono	flosponto
reklamacio	deklaro
rekvizicio	rekvizo (rekvizi, rekvizanto)
referento	referanto (refero, referi)
evolucio	evoluo
individualismo	individuismo (kiel internaciismo, imperiismo, militarismo)
revizio	revizo (radiko reviz', revizi, revizanto ktp.)
Siberio	Sibirio (ĉar estas Novosibirsk ktp.)
proletario	proleto
kvalifikita	kvalitita, kvaliteca
prokuratoro	prokuranto, prokuristo (radiko prokur'-) zorgo pro komisio

Nia vortaro devas havi nur vere bezonajn vortojn k radikojn. Novaj vortoj ne devas ŝarĝi nian vortaron, nek rompi unuecon de fundamenta gramatiko per enkonduko de novaj kvazaŭ "internaciaj" radikoj facilanime, senbezone k sensprite. Plej grava devo de LK, de ĉiu konscia esperantisto ne estas gardo de konservema k fakte reakcia "lingva disciplino", sed gardo de laŭfundamenta, laŭregula evoluo de esperanto. Notu bone, ke reguleco k simpleco de vortfarado kiel simpleco de ĉiu laborilo estas samnomo de perfekteco. T. n. "internaciaj vortoj" (aparte kiam ili estas tiom monstraj kiel **demonstro** aŭ **demonstracio)** fakte rompas Fundamenton, ĉar ili tute malatentas logikon k regulojn de vortfarado k ŝarĝas vortaron per novaj, senspritaj k superfluaj radikoj.

M. Krjukov.

DISKUTEJO

Ni ricevis jenan leteron:

Bremen, la 26-an de julio 1928.

En la n-o 199 de "S-ulo" mi tre interesite legis la artikolon "Inter ni". Jam delonge mi intencis fari, kion la tie menciita K-do faris, nome kritiki vian prinacian vidpunkton.

Mi taksas tre danĝera vian propagandon (1) de l' "pura" sennaciismo. Facile la SAT-anaro tiele povas fariĝi el gvidtrupo de l' internaciisma proletaro kvazaŭ defendanto de l' imperialismo. Se vi volas encerbigi al la proletoj de l' potencaj imperialistaj ŝtatoj (Eŭropo, Usono kaj Japanio) la marksajn vortojn: "La proletoj ne havas patrion" — mi tutkore konsentas. Tute alia estas la afero ĉe subpremataj popoloj kiel ekz. la ĉinoj (2) aŭ hindoj (3). Ili tute nature kaj prave taksas la fremdajn imperialistojn kiel siajn ĉefajn ekspluatistojn. La popolo simple rilatus al vi kiel al agento de l' imperialismo, se vi predikus al ĝi (4) sennaciismon. Ĉu vi eble rekomendas al la Nikaragvaj batalantoj (5), ke ili forĵetu la armilojn? (Cetere mi memoras, ke mi iam legis en "S-ulo" similan artikolon). — Aŭ al la ĉinoj? Ĉu vi estas kontraŭ la nacia liberigmovado en Egipitio (6) aŭ en la okcidenta Ukrainio? La nacia liberigmovado en la kolonioj estas tre forta subteno de l' proleta klasbatalo en la imperialistaj ŝtatoj kaj same de Sovetio. Se la revoluciaj partioj agus en tiu ĉi demando kiel vi (7), ili detruus sian bonfamon ĉe la subpremataj nacioj kaj malrapidigus tiel la venkon de l' prol. revolucio. Certe la nacia revolucio estas ankoraŭ burĝa revolucio, sed nur ĝi kapabligas la laboristajn

---

La multkoloraj, ilustritaj poŝtkartoj de SAT

estas unika provo, bilde esprimi nian idealon. En la korespondado kun varbotoj tiuj kartoj estos tre utilaj al vi. Tial aĉetu ilin ĉe la **Administrejo de SAT,** R Lerchner, Colmstr. 1, **Leipzig O 27.** La kompleta serio, konsistanta el 5 diversaj kartoj, kostas **0,50** g. mk.

amasojn al porsocialisma klasbatalo kontraŭ ilia propra burĝaro. Vi neas la necesecon por SAT-anoj partopreni nacian liberigbatalon. Mi diras male: Ili nepre partoprenu (8), laŭeble gvidante la movadon. Ni ne revu pri sennaciismo, sed batalakiru ĝin!

Kion vi proponas, kara K-do, estas anarkista, ne marksista metodo. Kiel la anarkistoj (9) en la politiko komencas je la finrezulto de la prol. klasbatalo, nome la komunismo, ne pripensante, ke ili nune devas batali kontraŭ la centraligita potenco de l' kapital. ŝtato, tiel same vi revas pri la finrezulto de niaj klopodoj, ne rigardante la objektivan situacion. Ambaŭ specoj de anarkismo ne utilas, sed malutilas al la liberigbatalo de l' Proletaro.

Kun prol. saluto via

Kurt Brumlop.

Rimarkoj: 1. Se mia vidpunkto estas erara k se oni lasas, kiel ni faras, la liberecon diskuti, mia "propagando ne povas esti danĝera". 2. Tie ni havas 6 abonantojn. 3. Tie ni ne havas eĉ 1 abonanton. 4. En la kritikata artikolo estas dirite: "Neniam ni proponis al nesamlingvanoj nian taktikon..." 5. Jes, certe! — aŭ prefere ili uzu ilin kontraŭ sia propra burĝaro[1]). 6. Mi estas nek kontraŭ, nek por: mi simple estas konvinkita, ke post la nacia liberiĝo de Egiptio, la tieaj proletoj restos — proletoj. Same kiel okazis al la poloj, ĉeĥoj ktp. 7. Mi tute bone komprenas, ke la gvidantoj de partioj agas aliel ol mi; mi provas konvinki nur lab. esp-istojn, ne aliajn. 8. En la Statuto de SAT nenio kontraŭdiras al tio; mi eĉ ĉiam kontraŭstaris al la emo de kelkaj K-doj enprogramigi la sennaciismon. 9. Pri la praveco de tiu aserto, oni legu en "S-ulo" n-o 198 la artikoleton: "Pri fama manifesto".

Mi simple aldiru, ke pri miaj skribaĵoj respondecas nur mi — k en iu "Inter ni" (n-o 193) mi eĉ argumentis, ke patriotoj povas aliĝi al SAT. Mi celas ĉefe pripensigi la legantojn k neniel intencas trudi miajn ideojn. Se K-do K. B. volas volontiĝi en la armeeton de Nikaragvo por batali kontraŭ la plej teknike evoluinta Usono, nu, li faru; ni ne riproĉos al li pro tio, ke li defendos la interesojn de la Nikaragvaj burĝoj. E. L.

EL NIA LETERARO

K-do el Bath (Anglio) skribas al ni i. a.: "..: Vi akre ripoĉis en S-ulo" mian malbonan esperanto-scion. Sed pripensu, ke mi estas ĉi tie la sola SAT-ano, laborista esperantisto. Bath estas urbo de parazitoj. Sekve de mia izoleco estas por mi tre malfacile ellerni bone la lingvon, ĉar mi ne havas okazon interparoli. Sed mi legas "S-ulo"-n kaj interŝanĝas leterojn kun eksterlandaj K-doj. Ses jarojn mi estis ministo (ĝis 1914), poste malsanulo kaj en jaroj 1919/20 preskaŭ ĉe morto. Sed mi resanigis min per herbaĵoj, ne plu fumis kaj ankaŭ partoprenis korpkulturon; tamen mi neniam tute resaniĝis. Mi demandas vin, kial vi enmetas tiom da artikoloj pri ateismo en la gazeto. Liberpensulo laŭ mia opinio estas homo, kiu la penson tenas libera kaj ne estas dogma fanatikulo. Ni nenion povas scii pri ekzisto aŭ neekzisto de dio; sekve ni ne okupu nin pri tiaj demandoj, sed prefere pensu pri klasbatalo, pri nia ekonomia situacio, nia ekspluatateco kaj metodoj por liberiĝi...

Via W. P. Reed (11 753)."

Malfermita letero

Mi, kiel SAT-ano, sciigas al ĉiuj K-doj, ke mi nun eksiĝis el neŭtrala burĝa organizo "Interniaro" k nun mi havas neniajn interrilatojn kun ĝi.

Kiev, 25. 6. 28.

N. Dujkin (8747).

Malfermita letero

La subskribinto, estante ne tute konscia pri esenco de neŭtralaj esperantistaj organizoj, aktive partoprenis neŭtralan organizon TEJA (Tutmonda Esp. Jun. Asocio). Nun, komprenint e ĝian esencon, mi ne povas plu restadi en la organizo k eksiĝas el ĝi.

Kiev, 1. 7. 28.

B. Judkin (9085).

SENDSTACIOJ KAJ ESPERANTO

Kelkaj radio-sendstacioj jam aplikas esp-on por disaŭdigo. Tamen la plej multaj ankoraŭ ignoras la intern. lingvon. Ni SAT-anoj radio-amatoroj ŝatas aŭdi esp.-lingvajn disaŭdigojn de la stacioj, aŭdeblaj de ni. Sed ofte tiuj stacioj ne uzas esp-on. Ni devas postuli de ili enprogramigon de esp-o. Sed kiel? Leningrada distrikta kom. de SEU proponas al siaj membroj sendi amase leterojn al la stacio, kun postulo enkonduki esp. horon. Ĉu tiu rimedo estas trafa? Mi opinias, ke ne. SEU-ano, kiu aŭdas Leningradan sendstacion, ja bone komprenas rusan lingvon. Sekve ne povas konvinki la stacion la argumentoj de samlingvanoj. Tamen, se ni turnas nin al stacio, kiu disaŭdigas en alia lingvo, ni povus havi sukceson. Mi aŭdas ĉe radio-akceptilo de K-do nur du staciojn, tiun de Leningrado kaj de Helsinki. La unuan mi bone komprenas, la duan tute ne, ĉar mi ne scias la finnan lingvon. Sekve mi devas skribi al la Helsinka stacio postulante enkondukon de esp-o, ĉar mi ne komprenas la nacilingvon. Se 50—100 aliaj K-doj sendos same tiajn leterojn, eble la sendstacio plenumos nian postulon. Sed por trovi la adresojn de tiuj stacioj, mi proponas, ke la koncernaj K-doj donu per "S-ulo" la adresojn de la konkerotaj sendstacioj. Ekz. mi petas finnlandajn K-dojn, sciigi per "S-ulo" la adreson de la Helsinka radio-stacio. Samtempe miavice mi donas la adreson de la Leningrada stacio por tiuj, kiuj ĝin aŭskultas: Leningrad, ulica Gercena n. 37, v Radio — peredaĉu. (4608)

Donacoj al SAT kaj ĝiaj Organoj

Fera Gvardio: Fedotov (Kiev), brikoj por julio ĝis dec. 1927 — 3 rubl.; Stefan (Iv.-Voznesensk) 5 rubl.; Neniu (Sovetio), brikoj por marto ĝis majo 3 rubl.; Paŭlo Tilin (Leningrad), laŭ alvoko de E. F. 1,60 rubl. kaj alvokas siajn amikojn: Pierre (Francio), Aul k Sinclair (Svedio), Mutoh (Japanio), Emeriko (Hungario), Georg, Karl k Herbert (Germanio), Richard (Ĉeĥoslovakio), Rudolf (Aŭstrio). Golubcov (Koskolovo), laŭ alvoko de Földi (Wien) 1 rubl. kaj alvokas jenajn K-dojn: Isajev (Redkino),

JUS APERIS **JUS APERIS**

La plej nova kajero de

Sennacieca Revuo

Literatura serio **Aŭgusto 1928**

ENHAVO:

Jack London: La matematiko de revo. Ĉapitro el "La Fera Kalkanumo". Trad. G. Saville. — S. Davidov: Fera Giganto. Vers. — Arpád Szélpál: Legendo pri la Junulo, kiu serĉiś kaj trovis la Homon. Trad. Ladislao Halka. — Voltaire: Candide aŭ la Optimismo. Fragmento. Trad. E. L. — St. Zausmer: Boryslaw. Vers. — S. Polev: Pri maljuna Tilabaj kaj pri dukapa birdo. Trad. A. Bokarjov. — Ida Lisiĉnik: Iom da naturo.

Depost la morto de la burĝa revuo "Literatura Mondo" (kiu estis eldonata dum kelkaj jaroj en Budapest), nia "Senn. Revuo" estas la

SOLA ESPERANTA LITERATURA GAZETO

en tutmondo. Fondita tuj post la mondmilito, ĝi persistis tra ĉiuj jaroj, arigante ĉirkaŭ si fidelan legantaran rondon. Sed tiu ĉi rondo estas ankoraŭ tro malgranda. Ni devas atingi, ke

ĉiuj esperantistaj literatur-amikoj abonu nian Revuon!

Mendu ĉe **Administrejo de SAT,** Colmstrasse 1, **Leipzig O 27**
(La kajero kostas **0,35 mk. g.**)

[1]) Aliparte nia K-do tro facile forgesas, ke la nuntempaj Nikaragvanoj estas la posteuloj de subpremintoj, pli ĝuste, de eksterminintoj. Estas ja bone konate, ke la "sendependaj" popoloj el Ameriko estis grandparte ekstermataj de la Hispanoj. Usono ne celas nun ekstermi la Nikaragvanojn, sed nur elfosi kanalegon por komunikigi la Pacifikan k Atlantikan oceanojn. Kaj mi havas la konvinkon esti tute en akordo kun la marksismo, asertante, ke tia entrepreno pli akcelas la historian procezon ol la "heroa" batalo de la patrioto Sandino por la sendependeco de "lia" lando.

Semjonov (Kingisepp), Nosko (Ŝkotovo), Golubev (Kostroma), Zuj (Vladivostok).

Jubileo - ĉeno: Anonimov (Kazan) 1 mk. g.; Drnauer (Wien) 0,50 ŝil.; Harms (Hamburg) 0,50 mk.; Bauer (Grünwald) 15 kr. ĉ.; Heumader (Wien) 0,50 ŝil.; Pachtman (Wien) 0,50 ŝil.; Augenŝtein (Wien) 0,50 ŝil.; Bouda (Nieder-Hanichen) 12,50 kr. ĉ.; Klimsza (Trinec) 500 kr. ĉ.

Municio: 4820 — 0,30 dol.; 783 — 9,42 mk. g.; 913 — 1,25 mk. g.; 7851 — 2 ŝil. aŭstr.; 8070 — 1,05 mk. g.; Grupo (Wels) 6,50 ŝil.; Satra (Wien) 1 ŝil. Adm.

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

SOVETIO. Kievo. En aprilo komenciĝis du novaj kursoj; en Buĉa, 30 km de Kievo, gvidas malnova pioniro de esp-o K-do V. N. Devjatnin; en Kieva Centra Klubo de konstrulaboristoj, gvidas K-do Fedotov (728). De 29. apr. ĝis 22. majo en Kievo gastis du germ. K-doj el Lausa ap. Dresden, ruĝfrontanoj K. Ridel (6052) kaj R. Caĥman. La K-dojn invitis loka junkom. organizo por partopreni unuamajan feston k pagis por ili ĉiujn vojaĝelspezojn. La K-doj dum sia restado vizitis pli ol 43 organizojn k kunvenojn farinte grandan propagandon. 11. majo en Centra Klubo de metalistoj okazis soleno pro kursofino. Ĉeestis ĉ. 2000 pers. Paroladis K-doj Ridel kaj Caĥman. 6. 5. okazis jarkunveno de Kieva SEU-organizo. K-do Ridel raportis pri esp. movado en Lausa k Dresden. Post raporto de l' komitato pri jara laboro oni reelektis K-dojn Carovski (8744), Fedotov (728), Golovanevski (7633), Kagarlicki (3635), Korolev (5365), Vail (5656) k Vajnŝtejn (5279). De 21.—26. majo en Kievo okazis Tutunia Kongreso de genikologoj k akuŝistoj. K-dino Fomina (6924) raportis al la kongreso pri esp-o. Ĉe la kongr. funkciis esp. ekspozicio. Loka junkom. gazeto "Juna Bolŝeviko" sendis delegiton al IV. kongreso de SEU kun mandato partopreni diskutadon pri intern. korespondado. (728.) — La Centra Kieva Klubo por presistoj elektis kiel oficialajn delegitojn al nia 8-a kongr. tri K-dojn. La klubo aranĝis inter. esp. vesperon, en kiu K-do Viktorov-Ĉeĥoviĉ faris lumbild-raporton pri esp-o. Kievaj presistoj sendis saluttelegr. al la 8-a. (5627.) — **Niŝnij-Novgorod.** La SEU-ĉelo ĉe telefon-fabriko je nomo de Lenin organiziĝis pro iniciato de K-do A. Ŝuvajev (7652) en okt. 1926 ĉe la klubo de l' telefon-fabr. Unua puŝo por la organizo estis la VI-a SAT-kongr., post kiu K-do Alalikin (3982) vizitis nian urbon. La unuan jaron gvidis K-do Piskunov (5432), la duan jaron k ĝis nun K-do Ŝuvajev. La ĉelo nun kalkulas en siaj vicoj pli ol 70 anojn (SEU-anoj, SAT-anoj k amikoj). Krom tio la ĉelo aperigis regule murgazeton k gvidas grandan koresp. kun eksterl. lab. grupoj k K-doj. Dum lasta jaro estis senditaj 88 let., ricevitaj 69; 14 let. aperis en murgaz. En konkurso pro varbado de novaj membroj nia ĉelo ricevis la 1-an premion. K-do Kraŭĉ (komjun. Usono) parolis 27. 1. 28 en amaskunveno en nia klubo por junularo. Nia vintra laboro jam estas organizata. — Ĉel-gvidantaro (7655).

Neŭtrala esp. kongreso sub polica kontrolo!

El la julia n-o de "Revuo Orienta" ni ĉerpas la komunikon, ke la 16-a Japana Kongreso de Esp-o (okazinta dum aprilo) en siaj laboroj estis treege malhelpata de la polico. En la kunvenoj ĉeestis kelkdek policanoj en siaj uniformoj, kiuj serĉis kaŭzojn de suspekto, por ĉesigi la kongreson. La kongresanoj eĉ estis devigataj subite ŝanĝi sian antaŭe difinitan kongresejon pro la polica interveno. Unu ĉeĥoslovaka esp-isto dum sia kelkmonata restado en Japanio konstante estis severe observata de la polico, tiel ke li sentis sin kvazaŭ persekutata.

ESPERANTISTA AKADEMIO

Estis elektataj kiel estraranoj unuvoĉe: Prezidanto: Prof. Cart; Vicprezidantoj: S-ro Warden, D-ro Dietterle; Sekciaj Direktoroj: Prof. Grosjean-Maupin, D-ro Lippmann.

AL ĈIUJ SAT-ANOJ

En sia n-o de 30-a de julio la ĉiutaga gazeto l' Humanité (La Homaro), centra organo de Kompartio de Francio, enpresis ĉefartikolon de Marcel Cachin (Marsel Kaŝen) proponante rektan korespondadon inter laboristaj korespondantoj de francaj k sovetaj gazetoj. Tiu alvoko estas direktita al labkoroj mem k al Centra komitato de franca Kompartio, laŭ peto ricevita de Marsel Kaŝen el lab. korespondantoj de Sovetio. Estas tempo por agi. Skribu multnombre, precipe el Sovetio, laŭ adreso: Sécrétariat du Parti Communiste, 120, rue Lafayette, Paris (Francio) parolante pri jam ekzistanta korespondado inter francaj labkor-oj k sovetaj gazetoj k individuaj K-doj, aŭ ankaŭ ĉeloj, kluboj ktp.

Estus des pli bone, se ne-komunistoj skribus. Notu en viaj korespondaĵoj ĉu vi estas komunisto, socialisto, anarkisto ktp. k ankaŭ, ĉu vi estas jam labkor-o.



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Raymond Schwartz, PROZO RIDETANTA. Noveloj originale verkitaj. Eld. Esperantista Centra Librejo, 51, rue de Clichy, Paris IX-e. 174 pĝ. Prezo: 2,50 gmk.

Esperantio estas nun en la sama epoko, je literatura vidpunkto, kiel Italio kiam ekverkis Dante, Boccaccio (Bokaĉjo), Petrarka — Francio kiam ekverkis Marot (Maro'), Ronsard (Ronsar'), Rabelais (Rab'leh') —, Germanio kiam ekverkis Luther (Lut'r), Hans Sachs. Sed male, esp-o estas firma lingvo. Ĝi ne hezitas en arĥaismoj, laŭmodaĵoj. Moderna ilo, ĝi povas naski ĉiajn infanojn, laŭ la talentoj, kiuj ĝin fruktigas.

Leginda, nepre leginda kiel ilo de arta kristaliĝo por nia lingvo, estas la verko de S-ro Remon Ŝvarc: "Prozo ridetanta". Esp-o, en tiu verko kiel en "Verdkata Testamento", vivas. Ĝi fluas en la buŝon kiel freŝa frukto, vinberoj, persikoj, pomoj. Ofte oni deziregas eklegi laŭte: "... sur ambaŭ bordoj de lace-pace fluanta rivereto", — "en la koro de l' vidvinoj ankoraŭ obstinis veanta vundo". Oni plurfoje antaŭsentas la proprajn ecojn de esp-o, ekzemple, por sprito, kiam la aŭtoro skribas, pri ĝendarmo kiu tute "faldiĝis" en ebriecon; (ili) plej helpeme "levis la ĝendarmaĵon sur la selon..." Bedaŭrinde, tiuj rakontetoj tro parencas kun ĉiulandaj praliteraturoj, kiuj kvazaŭ ĉie komenciĝis per farsoj kaj ŝerctrompoj, tute naivaj, neverŝajnaj. Ĉiaj komikaĵoj tute ne plu sufiĉas por kontentigi nian evoluintan komikan senton. Ĉu esp-o devus ankaŭ komenci per tiu ŝtupo? Ne. Burĝa manko, S-ro Ŝvarc! Tuta franca etburĝaro travivis la 19-an jarcenton, revolucion, artajn renaskiĝojn, sciencan naskiĝon, neniom komprenante, kantetante burleskajn ŝerc- aŭ neŝerc-operetojn, insultante Bethoven-on, Vagner-on, Berlio-on. Se ni estus romantikaj, ni aŭgurus por S-ro Ŝvarc, ke li suferu. Tiel, eble, lia verko viviĝus, plihomiĝus.

Sed ni ne romantiku. Eble sufiĉus, ke li plipostulu de si mem. Tiam, eble li donus al Esperantio aliajn "ridetantajn prozojn", en kiuj tremus iom kiel la rido aŭ rideto de la veraj komikverkistoj: Aristofano, Cervantes, Molière (Molier'), Courteline (Kurt'lin'), Tristan Bernard. Iom da profunda homa karaktero, taŭga kritiko de veraj mankoj, verŝajnaj roluloj, eĉ mokdesegnataj, eĉ burleskaj, mankas. Jief.

NI KANTU! Kolekto de 108 hungaraj popol- k laboristaj kantoj. Eld. Librovendejo de Hungaria Esp. Societo Laborista, Budapest 1928. 64 paĝoj. Form. 11½×15 cm. Prezo nemontrita.

Ni estas mirigitaj, ke laborista esp. asocio eldonas tian kantaron, post kiam ĉe SAT estas havebla plena kantaro kun muziknotoj. Sed kredeble niaj hungariaj K-doj preferas kanti nacilingve konatajn kantojn, kiuj estas plenaj de nacispirito... Ni tre bedaŭras devi konstati tion, sed ŝajnas vero, ke tiu bezono iniciatis la eldonon de l' libro. Konkrete: El 108 kantoj nur 17 estas laboristaj kantoj (signitaj kiel tiaj). Kaj inter ili eĉ mankas la Internacio (ĉu la hung. lab. esp-istoj ne bezonas koni ĝian esp. tekston eĉ se ili ne libere povas kanti tie ĝin?). Sed anstataŭe ni trovas "La Espero" k kelkajn aliajn neŭtralaĉajn kantojn. La plej granda parto estas hung. popolkantoj, pri kies poezia beleco ni ne dubas, sed kies spirito tute ne akordiĝas kun lab. ideologio. Kion diri pri la multaj kantoj, en kiuj oni fide alvokas dion, aŭ pri la soldatkantoj? Sed la eldoninto (SAT-ano) ja certigas al ni, ke la materialo estas "zorge elektita". — Restas diri, ke la lingvo k la poezia prilaboro estas preskaŭ senmankaj. (Ĉu la versoj akordiĝas kun la muziko, ni ne povas prijuĝi, ne havante la melodiojn). Vere la kompetentulo (s-ro Baghi?) tre lerte prilaboris la materialon. N. B.

GROMADA. Okcidenta Blankrusio k Blankrusa Kamparan-Laborista Unio. Eld. en esp-o de Komitato de Sciencaj Laborantoj kaj Verkistoj de BSSR por defendi Blankrusan Kamparan-Laboristan Union "Gromada". Trad. Dim. Snejko. Minsk, 1928. Havebla ĉe Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27. Formato 15×23 cm. 32 pĝ. Prezo: 0,30 gmk.

Tiu ĉi broŝuro konigas nin en klara formo kun la teritorio, loĝantaro, vivkondiĉoj de okcidenta Blankrusio, kiu per la packontrakto estis aljuĝata al Polio. Ĝi montras la grandegajn klopodojn de la pola registaro "poligi" la regionon k la kontraŭ-movadon organizitan de la kamparan-laborista unio "Gromada". Ĉi lasta estis malpermesata, ĝiaj gvidantaj membroj arestataj k kondamnataj en monstra proceso kun pli ol 400 akuzitoj antaŭ tribunalo. Tute aktuala broŝuro de politike alta signifo, bonege informa. Kompreneble ĝi celas pli ol nur informi: ĝi celas alvoki la tutmondan laborularon al batalo kontraŭ subpremo k perforto de reganta klaso de Polio. — La lingvo de la traduko estas klara k pura. La preso bela. N. B.

Dr. Ing. Ellerbeck, Lehrgang des Esperanto (Esp. kurso). Eld. Verlag H. S. Hermann & Co., Berlin SW 19. Prezo: 2,20 gmk., ŝlosilo 0,50 gmk. Form. 14½×20½ cm. 80 pĝ.

Al la multaj jam ekzistantaj lernolibroj por germanlingvanoj tiu ĉi nova aliĝas, verkita laŭ severe gramatika metodo, seke k sobre ("pruse"), de ministria konsilanto en regna ministrio por trafiko. Rilate la gramatikon ĝi estas klara k kompleta. Feliĉe laboristoj havas siajn proprajn lernolibrojn por ne bezoni traduki frazojn kiel: "Neniun landon mi ŝatas tiel, kiel mian patrolandon." (pĝ. 22.)

Esperantista Akademio, Jarlibro de la Lingva Komitato k de ĝia Akademio. Paris, 1928. Esper. Centra Librejo, 51, rue de Clichy, IX-e. Prezo: 2 fr.

ITF-kongreso k esperanto

La kongreso de l' Intern. Transportlab. Federacio (ITF) en Stokholmo akceptis proponon, kiu denove konfirmas la proponon de 1924 k admonas la sekretariejon de ITF daŭrigi sian ĝisnunan agadon por akcelo de la lingvo esp-o en ITF.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Vards, Riga, 18. 7., La kaŭzoj de milito (181); Munkas, Bratislava, 11. 7.; Accion, Mar del Plata, 5. 7. (Faktoj k komentoj, n-o 190); L'Universitaire, Bruselo, 1. 5. (Let. de Gorki); Stradnieku Avize (aldono "Atputai"), Liepaja, 29. 4., Krizo en ora lando (183), Vivo, vivo… (182), La disvastigo de la biblio (183); 27. 6., Rolo de kelkaj luter. sektoj (182), Hodiaŭaj ĉininoj (192); 1. 7., Instrua okazo (190).

Represis el "S. R.":

Le Jeune Camarade (Juna K-do), Paris, julio (Rakonto al SAT-anidoj, Ivn, majo).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Daily Herald, London, 20. 7.; Der Deutsche Eisenb., Berlin, 15. 7., 22. 7. (kurso); Sächs. Arb.-Ztg., Leipzig, 14. 7.; Muldenthaler Nachrichten, Lunzenau, 21. 6.; The Workers Monthly, Olderŝot, julio; Accion Cooperatista, Barcelona, 20. 7.; Semajn. rap. de VOKS, Moskvo, n-o 28/29 (resumo en esp.); D. D. Eisenbahner, Berl., 29. 7.; P. T. T., Paris, julio (pri k peresp.); L'Emancipation, Marseille, julio (ankaŭ pri SAT); Informa Bulteno de VOKS, Moskvo, n-o 30/31 (res. en esp.); Daily Herald, London, 27. 7.; PAX, Paris, 27. 7.; Ruhr-Echo, Essen, 24. 7. (esp. angulo dufoje semajne); The Bournemouth Daily Echo, 16. 7. (longa art. de K-do Stay); Die Einheit (Unueco), Berlin, 29. 7., 5. 8. (pri SAT-kongr.); Forward (Antaŭen), Johannesburg, 6. 7. (pri SAT-kongr.); Stradnieku Avize, Liepaja, 1. 5. (unuamaja devizo, en esp., pag. anonco); 27. 6. (div. notoj).

ATENTU!

La loĝio 109 Kungsholmen aranĝas la 26. 9. 28 "Internacian letervesperon". Ĉiujn leterojn k kartojn ni respondos akurate. Adresu al: Ludvig L. Landin, Tegnergatan, 47/3, **Stockholm** aŭ al: F-ino Sonja Ytterberg, Saltmätaregatan, 12, **Stockholm** (Svedio).

PETEGO AL GEK-DOJ!

Mia filo, **Vladimir Zilek,** malaperis dum la mondmilito ĉe **Grodek** (Rusio) en la tempo de 9.—11. septembro 1914. Li naskiĝis en la jaro 1889 en Sarajevo, studis poste en Zara (Italio) kaj Vieno (Aŭstrio) kaj foriris al la fronto en aŭgusto 1914 kun la 47. infanteria regimento (de tiama aŭstra-hungara monarkio) al Galicio, de kie li lastfoje skribis al siaj gepatroj 9. sept. 1914. Depost tiu ĉi tempo oni nenion plu aŭdis pri li.

Koncernaj K-doj, kiuj eble ion povus diri pri li, estas elkore petataj sciigi tion rekte al lia patro aŭ al la **Administracio de "S-ulo".**

Mi tre volonte pagos ĉiujn kostojn kaj elspezojn.

Emilijan Zilek, patro, Zvezna tiskarna, **Celje,** Strosmajerjeva ulica, Slovenio, Jugoslavio.

NIA POŜTO

11 753. — Ni jam konstatas pliboniĝon en via skribmaniero. Tamen por ni estas tro da tempraba laboro prilabori (laŭ lingvo k stilo) viajn skribaĵojn. Per multa legado certe vi akiros pli da kapabloj. Ni ne povas promesi uzi tradukojn (ekz. el "Dimanĉa Lab."), ĉar ni preferas orig. art. pri lab. vivo. Vi trovas parton de via let. en ĉi tiu n-o.

L. K., Halifax. — Vi vidas, ke ni uzis vian art., sed klopodu konstante, pli bone ellerni la lingvon. Precipe pri la ĝustloka apliko de l' akuzativo vi ne havas klarecon.

603. — Ni sciigas vin, ke ni ricevis el Tokio tre taŭgan artik. pri Studenta movado en Japanio, kiun ni povos uzi por via venonta paĝo. Ĝi havas amplekson de unu kolono en "S-ulo".

5627. — Ni ricevis vian pk, sed ne salutlet. okaze de 200. n-o. K-do Lanti dume forvojaĝis.

1741. — Ni posedas multajn tiaspecajn artik. Loko mankas por enmeti.

6775. — Tiajn alvokojn ni ne enmetas senpage.

10 336. — Tiu sektor-afero ne plu gravas. Ni baldaŭ enkondukos la novan sektorsistemon. Preferinde estus, se ĉiu membro mem sciigus la sektoron al ni.

Al kelkaj. — Pro frua fino de l' redaktado por tiu ĉi n-o viaj artikoloj aperos nur en la venonta(j) n-o(j). N. B.

8560. — Ricevis vian trad. 6. 8.! Ĝi estus tro malaktuala jam, kiam ni povus enmeti. Ĉar ĝi estas verkita por speciala memortago, k tiucele en agiteca formo; ĝi perdus sian esencon en iu venonta "S-ulo". Ni preferas originalan priskribon de vivkondiĉoj aŭ lab. bataloj (kiel ni jam diris al vi).

7369. — La Parizaj K-doj klopodis k havis sukceson. Atentu la venontajn n-ojn de "N. R."

NEKROLOGO

La 19. julio 1928 mortis dronante en rivero nia K-dino

ANNA DEREVJANNIK
(SAT-anino 12 875)

el Ufa (Sovetio) en aĝo de 20 jaroj. Kvankam nova membro, ŝi estis vera SAT-anino k aktiva esperantistino.

Honoron al ŝia memoro! (5388)

Plenan bildon pri la kultura vivo de l' Sovetaj respublikoj, pri iliaj ekonomio, literaturo, artoj, ktp. donas ilustrita ĵurnalo

La Informa Bulteno

de la "Societo por kulturligoj de USSR kun eksterlando" ("VOKS"), aperigata en tri eldonoj — en germana, angla kaj franca lingvoj.

"La Informa Bulteno" ekzistas jam la 4-an jaron kaj aperas la 1. kaj 15. de ĉiu monato. La abonprezo estas:

	1 eld. dol.	2 eld. dol.	3 eld. dol.
Por jaro	2.—	4.—	5.50
„ duonjaro	1.—	2.—	2.75
„ kvaronjaro	0.60	1.20	1.73

Ĉiuj abonintoj ricevas senpage informojn pri ĉiuj demandoj de kultura vivo en USSR.

Provnumero senpage.

Mendojn k abonmonon sendu al Administracio de SAT: **Richard Lerchner, Leipzig O 27, Colmstr. 1.** Poŝtĉeka Konto: Leipzig 6835.

Kamaradoj, surmetu viajn okulvitrojn!

Duafoje oni petas informon de iuj landoj krom Sovetio kaj Britio pri **maltusianisma, eŭgenika** kaj **naskevita movadoj,** ĉefe pri la rilataj leĝoj, amplekso de agado k historio ĝisdata. La informo estas bezonata por estonta SAT-eldonaĵo k devas esti sendata al: "Esperanto", 14, avenue de Corbéra, **Paris, XII-e.**

ATENTU!

La ĉefsiberiaj redakcioj de gazetoj k ĵurnaloj: "Juna Laboristo", "Juna Leninano" k "La nova Vilaĝo" serĉas gekorespondantojn pri junulara, virina k vilaĝana vivo. Abunde sendu materialojn. Rekompenco kaj respondo estas garantiata. Helpu varbi por nia movado! — Peras K-do Ŝ. Goldfeder, "Esperanto", **Barnaul,** Siberio (Sov.)

HELPU AL NIA PROPAGANDO!

Komencante de la dua parto de aŭgusto en nia grandindustria urbo okazos multaj partiaj k sindikataj, vir-, virin- k junulkonferencoj k kunvenoj.

Dum ĉi tiuj konferencoj ni aranĝos propagandan esp. ekspozicion de internacia rilato.

Do, K-doj el ĉ. l. bonvolu sendi al ni div. materialojn por la ekspozicio: esp. k naciajn gazetojn k ĵurnalojn, L, PK.

Ĉio estos rekompencata per sama kvanto da samkvalita materialo. Krom tio la 2. sept. niaj junulaj organizoj festos "Tagon de internacia junularo", do sendu salut-leterojn. Ĉion adresu al:

K-do **S. Bogdanov,** ul. Sverdlova, 58, **Lugansk** (Sovetio).
Por Urba Komitato de SEU.

ENHAVO:

	paĝo
La faŝismo en Japanio	375
Kapitalismo malraciigas siajn viktimojn	376
Sakko kaj Vancetti	377
La grenrikolto en Usono	377
Letero el sendependa Portugalio	377
La vivo de la aŭstria laboristaro	377—78
Poeto Ŝevĉenko	378
Krimiĉaŭ	378—79
Mia domo	379
Orientpolitiko	380
Ni ripozas	380—81
El la historio de l' socialismo	381
Tago el la vivo de ŝipa maŝinisto	381—82
Tra Esperantio	382—86
Korespondado, Anoncoj	386

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)